


1983 julio-aŭgusto
76a jaro
n-ro 931-932 (7-8)
aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — 3015 bj rotterdam — nederlando



Aŭstralio serĉas novan lingvopolitikon

Vi trovos

ĉi tiun numeron en via leterkesto frue en aŭgusto (se vi mem estos tie, post kongresoj, ferioj kaj simile). Tiel finiĝas nia plurmonata baraktado pri la reakuratigo de la revuo. Dankon, ke vi eltenis. Ni apenaŭ. Tiuj, kiuj grumblis pro la malfruo, nun legu la numeron! Ne diru, ke vi plendas nur por malfaciligi la vivon al la redakcio!? Cetere, ĉu vi rimarkis, ke lastatempe relative ofte aperas la rubriko "Reagoj"? Reagu foje mem. Tiel ni povos kompromisi inter tio kion vi volas kaj tio kion ni volas fari el ĉi tiu revuo. Ĝis (alie ni malfruas al la Kongreso)!

Enhavo

- 121 Movado: "Uneskismo (se ĝi ekzistis) estas fora pasinteco (S. Milojević)
- 122 Landa agado: Strategia planado en Aŭstralio (R. Harry); D-rino Szabó-Felső ĉe Ingemund Bengtsson
- 123 En novembro: Festivalo en Parizo
- 124 Afriko: Movada kerno en la nigerio Ondo (Hans Bakker)
- 125 Monda Komunika Jaro: Islamo, Irano kaj Esperanto (M.H. Saheb-Zamani)
- 126 Multaj gestoj en La Chaux-de-Fonds
- 127 Gazetaro: Kial *Unesko-kuriero* ne aperas en Esperanto?
- 129 Kongresoj: Fervojistoj en Belgio (G. Ritterspach)
- 130 Reagoj: Ni esploru la faktajn motivojn por lerni Esperanton! (Helmut Welger)
- 131 *Akademiaj studoj 1983* estas privata eldonaĵo (Werner Bormann); Francoj ne edukas Esperanto-instruistojn (R.G.)
- 132 Opinioj: Kiu estas kaj kiu estras UEA?
- 133 Kulturo: Kiom gravas la Esperanta literaturo? (Leopoldo H. Knoedt)
- 134 Recenzoj: *La fermita urbo* kaj *La blinda birdo* de I. Nemere (K. Schubert); *Siberio en neĝo* de D. Kurosima / M. Miyamoto (R. Corsetti); *Manlibro pri ĵurnalismo* de J. Junger kaj S. Maul (Y. Izumi); *Plansprache und Nationalsprache* de D. Blanke (O. Reiersøl)
- 136 Laste aperis... (novaj eldonaĵoj en aŭ pri Esperanto)
- 137 TEJO: Seminario en Berlino
- 138 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 140 Oficiala informilo de la CO de Universala Esperanto-Asocio; Anoncetoj

La kovrilo

Jen unuafoje, almenaŭ en la lasta jardeko, la plej malgranda kaj la plej fora kontinento sur nia kovrilo. La aŭstralia ĉefurbo Kanbero supre, la fascina operdomo de Sidnejo sube, kaj la plej elstara aŭstralia esperantisto Ralph Harry "pendas" ie tie, supre, kvazaŭ grandega surstrata portreto, simila al tiuj de Maŭ antaŭ jaroj en Pekino. Eble la homoj en Melburno, Perto aŭ Brisbano plendas, ke mankas ilia simbolo sur nia kovrilo. Nu, mankis al ni konvena foto. Sed, kial subite Aŭstralio sur la kovrilo? Ĉar io okazas tie (vidu la paĝon 122), ĉar ĝi per novaj iniciatoj provas nun venki sian izolitecon de la resto de la esperantistaro. Kiel ĉiuj niaj kovriloj, ankaŭ tiu ĉi estas investo, ĉar grandaj novaĵoj el Aŭstralio venos nur poste. Vi eble aŭdis, ke Brisbano kandidatas por organizi la Universalan Kongreson en 1988.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nwe Binnenweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

Telefono: (010) 36 15 39.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Fondita en 1905 de M.P. Berthelot (1881-1910). **Legata en 102 landoj.**

Redaktoro: Simo Milojević.

Abonprezo varias laŭlande (Gld. 39; US \$ 18; GM 36; enoj 3150 ktp); petu informojn ĉe via landa asocio aŭ de la ĉi-supra adreso. Unuopa ekzemplero kostas 4,00 guldenojn.

Anonctarifo (gld.): 1 p. 1 000, 1/2 p. 530, 1/4 p. 290, 1/8 p. 170, 1/16 p. 110. Instancoj kaj entreprenoj de la Esperanto-movado rajtas rabaton de 50 %. Eksterakvtilaj anoncoj kostas duoble. Ripetrabato 20 %.

Banko: Bank Mees & Hope, Coolsingel 93, 3012 AE Rotterdam (konto n-ro 25.52.89.804).

Ned. poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri financo kaj administrado: s-ro Grégoire Maertens, Prins Leopoldstr. 51, B-8310 Brugge, Belgio; ☎ (050) 35 49 35.

Vicprezidanto kaj estrarano pri planado kaj landa kaj regiona agado: d-ro Renato Corsetti, via Collazia 21/1, I-00183 Roma, Italio; ☎ (06) 75 85 679.

Vicprezidanto kaj estrarano pri kulturo kaj edukado: s-ro Baldur Ragnarsson, Sogavegur 170, IS-108 Reykjavík, Islando; ☎ (91) 3 73 01.

Ĝenerala sekretario: d-rino Flóra Szabó-Felső, Zója u. 5/b VII, 22., H-7624 Pécs, Hungario; ☎ (72) 23-274.

Estrarano pri informado kaj delegita reto: s-ino Ursula Grattapaglia, Fazenda Escola "Bona Espero", BR-77260 Alto Paraíso (GO), Brazilo; ☎ (061) 226 8101 (en Brasília).

Estrarano pri kongresoj kaj virina agado: s-ino Eliza Kehlet, Heideweg 20, B-2120 Schoten, Belgio; ☎ (03) 651 46 36.

Estrarano pri faka agado: s-ro Petâr Todorov, ul. Veĵen 2, ap. 10, BG-1421 Sofia, Bulgario; ☎ 65 52 43.

Estrarano pri esploroj kaj eksteraj rilatoj: prof Humphrey Tonkin, Stouffer College House, 3700 Spruce Street, Philadelphia, PA 19104, Usono; ☎ (215) 387 8288.

"Uneskismo" (se ĝi ekzistis) estas fora pasinteco

Delonge jam, kaj precipe dum kelkaj lastaj jaroj, oni en pluraj movadaj rondoj provas revivigi diversajn arkaikiĝintajn akuzojn, direktitajn ĉefe al UEA. Tie kaj jene oni ankoraŭ povas legi flamlangajn atakojn kontraŭ kelkaj malnovaj epitetoj, kiujn oni erare – nun kiel antaŭe – atribuas al la gvida internacia organizaĵo de la esperantistaro. Oni akuzas la Asocion pro: "centrismo", "uneskismo", "desuprismo", "prestigiismo" ktp.

La akuzoj pri "uneskismo" ne aĝas nur tri jardekojn, kiel la konata rezolucio de Unesko el 1954. Oni povus tiucele reiri al la intermilitaj klopodoj pri Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj. Zamenhof mem, verŝajne, estis la unua "kulpulo" pri "uneskismo", eble en Bulonjo-sur-Maró jam, kiam li renkontis lokajn aŭtoritatulojn, kiam li – multe pli frue – klopodis havi apogon al sia lingvo ĉe tiaj prestiĝaj homoj, kia ekz. estis Leo Tolstoj aŭ diversaj francaj akademianoj.

"Uneskismo" hodiaŭ ne ekzistas kiel ajna gvida doktrino en UEA. Ĝi fakte neniam ekzistis kiel baza orientiĝo en la agado de la Asocio. Ĝi eventuale figuris pli aŭ malpli grave en la kapoj de kelkaj movadaj gvidantoj tra la pasintaj jardekoj, sed ĝi neniam eniris la bazajn gviddokumentojn de UEA.

Kion hodiaŭ signifas en UEA "uneskismo", "desuprismo", "prestigiismo"? Ĝi estas nur internacnivela klopodo rompi la movadan izoliĝon kaj troviĝi tie, kie estas la resto de la mondo. En la diversaj konferencoj, kunsidoj, laborgrupoj ktp. ĉe Unesko, la reprezentantoj de UEA sidas ĉe la sama tablo kun la plej diversaj internaciaj organizaĵoj, kiuj agadas sur preskaŭ ĉiuj kampoj de la homa aktivado. Oni ne diskutas tie pri Esperanto, nek UEA volas, ke en la nuna stadio tio okazu. Oni traktas tie aktualajn demandojn de la nuntempa internacia vivo, kiel ekzemple la komunikadon ĉi-jare. UEA – kaj tio ĉi foje signifas la esperantistaron – havas ion por diri pri tiaj demandoj. La ĉeesto de UEA en tiaj kunvenoj, en Unesko, en Unuiĝintaj Nacioj, en Eŭropa Komunumo aŭ kio ajn simila, estas simple internaciskala informado pri la Internacia Lingvo kaj pri la Esperanta lingva komunumo. UEA do faras tion en la internaciaj sferoj, kion provas fari ĉiu loka Esperanto-klubo en sia urbeto, ĉiu unuopa esperantisto en sia strato aŭ korto aŭ lifto. Estus nerealisme atendi, ke iu alia en la Movado faru tiun parton de la informado kaj malizoliĝo. Estus absurde pensi, ke infor-

mita ambasadoro aŭ funkciulo de internacia organizaĵo valoras malpli, ol informita studento aŭ laboristo.

"Centrismo" eble tamen estas termino, kiun ne eblas meti sub la saman ĉapelon pri kiu ni okupiĝis ĉiantaŭe. Sed pri kia "centrismo" oni entute parolas? Kiu landa asocio aŭ ĉiu loka Esperanto-klubo atentigas kaj atendas preskribojn de UEA, kiel agi por Esperanto aŭ kiel ĝui sian esperantistecon? Kiu eldonejo konsultas UEA pri siaj eldonplanoj? Kiu organizanto de kia ajn movada kongreso aŭ kunveno petas aŭ bezonas konsentojn de UEA por efektiviĝi sian entreprenon. Estas ja vero, ke pluraj organizantoj de la diversaj semajnfinoj kaj skiferioj revas pri tio, ke iliaj aranĝoj populariĝu kaj kresku ĝis la nivelo de la Universalaj Kongresoj. Sed tio ial ne okazas, kaj ĝi certe ne povas okazi en la daŭro de kelkaj jaroj aŭ jardekoj. Ni dirus, ke la Universalaj Kongresoj estas organizataj de UEA "centre", ĉar neniu alia en la Movado havas la necesajn financajn kaj homajn rimedojn por organizi ilin. Same tiel, *Esperanto en perspektivo* kaj *Plena analiza gramatiko* aperis ĉe UEA, ĉar neniu alia en la Movado kuraĝis entrepreni tiajn eldonprojektojn. Pro la samaj kaŭzoj ĉe UEA aperos *Nova Esperanta antologio*, *Nova krestomatia* kaj *Nova enciklopedio de Esperanto*. Anstataŭ kritiki tian "centrismon", ni povus nur bedaŭri, ke ĝi ne ekzistas sur pluraj movadaj kampoj, kaj ke oni disŝutas amason da mono kaj energio pro la simpla malcentrismo kaj egoisma emo havi sian propran broŝuron, sian propran bultenon.

Ĉiu kiu sekvas la vivon de UEA dum la lasta jardeko povas facile trovi malcentrismajn maluneskismajn ĉeftraĵojn en la hodiaŭa vivo de la Asocio. Se oni tamen volas nepre kritiki la nunan agadon de UEA, – kaj oni ja faru tion – tiam la celoj de tiaj elpaŝoj devus esti tute aliaj epitetoj kaj ismoj, kiujn la Asocio efektive praktikas en sia lastatempa vivo. Oni povus prave "akuzi" UEA pro "iranismo", ĉar tra la lastaj jaroj ankaŭ ĉi tiu revuo dediĉis pli da spaco al la movadaj evoluoj en Irano, ol al Unesko. Tiu "iranismo" enestas la fundamenton de la decido krei en Budapeŝto la Sciencan Eldonan Centron de UEA. "Brazilismo" estas alia pravigebla "akuzo", ĉar UEA kuraĝis, post pluraj jardekoj da hezitado, kongresi tie kaj ekatenti la duan plej fortan kontinenton en la Movado. Riproĉoj pro "ĉinismo" taŭgus ankaŭ, ĉar la Asocio kun grandega atento sekvas la Esperantan laboron tie, kunlaboras kun Ĉina Esperanto-Ligo kaj eĉ planas kongresi en Pekino post kelkaj jaroj. La plej freŝdataj akuzoj povus temi pri "taĥzaniismo", "eburbordismo" kaj ĝenerale pri "evolulandismo", ĉar la Asocio "ĵetas" grandajn monsumojn por reagi al centoj da informpetoj tie, por organizi korespondajn kursojn en Azio kaj Afriko, por eldoni la bazajn lernilojn en la svahila, bengala, malagasa ktp. Do, ek al kritiko!

sm

Strategia planado en Aŭstralio

Ni ofte emas paroli pri la izoliteco de aziaj, afrikaj aŭ sud-amerikaj esperantistoj. Tamen, ankaŭ aŭstralianoj kaj nov-zelandanoj devus senti sin izolitaj kaj geografie plej malproksimaj de la tradiciaj movadaj centroj. Bona "medikamento" kontraŭ la izoliteco estas mem fariĝi grava centro kaj iniciati paŝojn, kiujn la resto de la Movado ankoraŭ konsideras kuraĝaj. Io tia nun okazas en Aŭstralio, kiu kandidatas por organizi la Universalan Kongreson en 1988. Jen raporto de Ralph Harry:

La 18an de junio, responde al invito de la Aŭstralia Asocio por Unuiĝintaj Nacioj kaj Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA), grupo de tutlandaj organizaĵoj, kiuj okupiĝas pri internacia interkompreno, kunvenis en la ĉefurbo Kanbero, por inaŭguri laborgrupon favoran al Esperanto.

Partoprenis, aldone al la estraro de AEA, la prezidanto de la Asocio por Unuiĝintaj Nacioj, komitatano el la Aŭstralia Federacio de Asocioj de Instru-

istoj de Modernaj Lingvoj, vicprezidanto de Virina Kristana Organizaĵo por Abstinemo kaj reprezentanto de la Societo de Amikoj (kvakeroj). Ĉeestis kiel observanto ankaŭ la nacia direktoro de la Instituto pri Internaciaj Aferoj. Prezidis s-ro Ralph Harry, prezidanto de AEA.

Post tuttaga informado kaj diskutado pri Esperanto (historio, lingvo, organizaĵoj, literaturo, instrumentoj) kaj vizito al la Nacia Biblioteko de AEA, la kunveno unuanime akceptis rezolucion, kiu:

a) aprobis la submeton, jam faritan de AEA, de proponoj al la Senato de la Aŭstralia Parlamento, kies Komitato pri Edukado kaj la Belartoj nun enketas pri kunordigita lingva politiko por Aŭstralio;

b) starigas laborgrupon por plani: 1. publikan informadon; 2. prezentojn al la Federacia Registaro pri la neceso subteni Esperanton internacie; 3. programojn por la enkonduko de Esperanto en porinstruistajn kolegiojn, lernejojn kaj universitatojn;

c) invitis AEA, la Asocion por UN kaj la asociojn de instruistoj skizi proponojn por la laborgrupo.

La partoprenintaj organizaĵoj havas kune ĉirkaŭ 10 000 membrojn kaj la rezolucio multe helpas al AEA en rilatoj kun registaraj kaj parlamentaj instancoj.

Ralph Harry

D-rino Szabó-Felső ĉe Ingemund Bengtsson

La altaj protektantoj de niaj Universalaj Kongresoj akceptas tiun honoran postenon jen pro siaj oficaj devoj jen pro sincera amikeco al la Internacia Lingvo. Pri Ingemund Bengtsson, prezidanto de la sveda parlamento, estis nenia dubo, kiam li akceptis rolin en 1980 kiel protektanto de la 65a UK en Stokholmo, – li faris tion pro amikeco. Ne nur, ke Bengtsson venis por persone alparoli la kongresanojn, sed li ankaŭ post la Kongreso plurfoje faris favorajn elpaŝojn pri la Internacia Lingvo. Jen la plej freŝa informo tiurilate: La 19an de majo ĉi-jare Bengtsson akceptis d-rinon Flóra Szabó Felső, ĝeneralan sekretarion de UEA (vidu la foton). Fakte, la konversacio okazis en Esperanto! "Nun somere, dum la liber-



tempo, mi plibonigos mian kapablon paroli Esperanton, ĉar mi vizitos Ĉinion en septembro, kaj estus ege interese renkonti esperantistojn tie", diris la prezidanto Bengtsson.



En novembro: Festivalo en Parizo

Vi certe legis en aliaj movadaj periodaĵoj, ke UEA planas okazigi la Universalan Kongreson en la Jubilea Jaro 1987 – en Varsovio, la naskiĝurbo de la Internacia Lingvo. Kompreneble, ke la definitiva decido pri la loko de la kongreso en la Jubilea Jaro ankoraŭ ne estas farita, ĉefe pro la sociaj kaj ekonomiaj problemoj, kiujn spertas Pollando dum kelkaj lastaj jaroj. Tamen, la deziro kongresi ĝuste tie en 1987 restas forta, kaj la tiurilatajn kialojn ne necesas aparte argumenti.

Sed vi verŝajne ne sciis, ke la plej serioza konkuranto al Varsovio ĉi-rilate estis Parizo. La Estraro de UEA apenaŭ sukcesis resti en paco kun Unuiĝo Franca por Esperanto (UFE), kiu arde deziris gastigi en la franca ĉefurbo la plej grandan movadan manifestacion en la Jubilea Jaro. Oni eble sukcesis kvietigi la francojn nur per la promeso, ke la centra celebrado de la Jubileo tamen komenciĝos en Parizo, kie frue en 1987 devus okazi granda scienca konferenco pri la Internacia Lingvo, pri kio ankaŭ Unesko promesis sian kunlaboron.

UFE nun elpaŝas kun alia interesa iniciato: ĝi volas havi en Parizo grandan festivalon en 1987, kun

centoj da partoprenantoj kaj spektantoj. Kaj, oni ne atendas la Jubilean Jaron mem por pretiĝi, oni jam nun komencas "ekzer-ci". Ĉi-jare, la 26an kaj 27an de novembro, en bela teatro, meze de Parizo (apud la fama Centro Beaubourg), okazos la Unua UFE-Festivalo. Dum tiuj du semajnfinaĵoj, la partoprenantoj povos ĝui minimume kvin spektaklojn en kiuj prezentiĝos du teatraj trupoj, ok kantistoj, kabaredo ktp. Cetere, la listo de la partoprenantoj en la programo ankoraŭ ne estas fermita, kaj do povus okazi, ke kvin apartaj spektakloj ne sufiĉos por enteni ĉion prezentotan.

La organizantoj ĉe UFE (4bis, rue de la Cerisaie, F-75004 Paris) atentigas, ke fakte ne ekzistas ia aliĝkotizo por la Unua Festivalo. Ekzistas nur la enirbiletoj por la unuopaj spektakloj. Vi do mem povas decidi, ĉu la Festivalo kostos por vi 30 aŭ 150 francajn frankojn, depende de tio, ĉu vi volas spekti unu aŭ ĉiujn kvin programojn. UFE volonte peros eventuale lajn hotelmendojn aŭ tranokton ĉe privataj adresoj.

Kiel aludite pli frue, ekde nun okazos UFE-Festivalo ĉiujare ĝis 1987 (kaj eble eĉ preter la Jubilea Jaro). Tiel la nova iniciato de la franca landa asocio de UEA havas eblecojn populariĝi en la lando kaj ekster ĝi dum la venontaj kvin jaroj. Kiel vi vidas, oni ankoraŭ ne certas pri Varsovio en 1987, sed Parizo tiurilate sonas tute definitive.

Movada kerno en la nigerio Ondo

En la pasinteco okazis pluraj provoj konstrui movadan kernon en Nigerio, la plej multhoma kaj unu el la plej ekonomie fortaj landoj en Afriko. Tiajn klopodojn faris i.a. la anglo Norman R. Smith, kiu dum multaj jaroj vivis en Nigerio, kaj la japano Koki Tubota, kiu kelkare laboris tie. Oni konstatis malmultan progreson. Ŝajnas, ke neniel helpis ankaŭ la fakto, ke la diplomato Philip Ogwuazor, eble la plej kompetenta afrika esperantisto, estas nigeriano (kiu tamen plej ofte oficas en eksterlando). Nun la perspektivoj de Esperanto en Nigerio ŝajnas esti pli helaj. Hans Bakker raportas:

La lastatempa evoluo de la Esperanto-agado en Nigerio estas karakterizata de la laboro de du personoj, s-ino Helga Farukuoye kaj s-ro Godwin Ijenekhuemen Oboh.

La lastnomita sin prezentis en la printempo de 1982 al multaj esperantistoj, kies adresojn li iel eksciis, per leteroj en tre malbona Esperanto. Evidente temis pri komencanto, kiu tamen kuraĝis tuj lanĉi sin al la praktikado de siaj scioj, kio en si mem estas laŭdinda. Efektive, en la postaj monatoj lia lingvoscio rapide pliboniĝis, ĝis nivelo ne perfekta, sed tamen tre sufiĉa por normala uzo. Evidente temas pri homo entreprenema kaj inteligenta.

Tiuj kvalitoj esprimiĝis ankaŭ en lia agado kiel "profesoro en la Universitato de Ekpoma" en la urbo Illeh. La presaĵoj de tiu "universitato" aspektis iom groteskaj, primitivaj kaj ne fidovekaj. Post ioma hezito la Komisiono pri Regiona Agado, petinte konsilojn kaj opiniojn de eŭropaj spertuloj pri Afriko, tamen akceptis lin kiel seriozan lernanton, kiel ankaŭ estontan organizanton de la Esperanto-agado en Nigerio. Efektive, fine de 1982 li komencis la instruadon perkorespondan (laŭdire al dudeko da studentoj) kaj anoncis la kreon de Nigeria Esperanto-Ligo. Intertempe li ricevis helpon de UEA, en la formo de lernolibroj, legaĵoj, repago de siaj poŝtelspezoj (li korespondis mirige multe). Tiu helpo venis ne nur de la Centra Oficejo de UEA, sed ankaŭ de aliaj helpopretaj esperantistoj.

La kontakto kun s-ino Helga Farukuoye evoluis dum la sama periodo. En marto 1982 ŝi informis al UEA, ke ŝi ekloĝis en la urbeto Ondo, en la Kolegio Adeyemi, kaj pretas ion fari por Esperanto tie. Ŝi estas aŭstra, edziniĝinta al nigeriano, kaj dumviva membro de UEA. Tamen ŝia vivo ne estis facila post la ekloĝo en Ondo en 1980. Ŝi instruas tie la francan lingvon, verkas disertacion, edukas siajn du filinojn,

adaptiĝas al tute alia vivo – kaj krome akceptas taskojn por Esperanto.

Tiel ŝi ekinstruis en la somero de 1982 al du kolegoj per la lernolibro *Teach Yourself Esperanto*, *Privilegia vojo* kaj la angla vortaro de John Wells. Tiu-tempe ĉiujn librojn pagis ŝi kaj ŝiaj gepatroj mem, sed poste montriĝis, ke tio konstante kaj neelteneble ŝarĝus la familian buĝeton. Tial UEA plusendadis lernolibrojn je la kosto de Fondaĵo Azio-Afriko. Ne nur la libroj kostas, ne nur la ekspedado kostas, sed ankaŭ la perdoj en la poŝto kostas. Tamen, post duonjaro ŝi nun disponas pri sufiĉaj libroj por instrui.

S-ino Farukuoye mem produktis kasetojn akompane al la lernolibroj, por ke lernantoj povu ekzercisian parolan lingvouzon. Iom post iom grandiĝis la nombro de lernantoj, kaj nun – post kelkaj prelegoj en marto kaj poste, antaŭ siaj kolegoj, antaŭ la studentoj kaj antaŭ la personaro – veraj kursoj okazas por pli ol cent interesitoj! Oni antaŭvidas post kelkaj monatoj daŭrigan kurson kaj novajn porkomencantajn kursojn.

Sed la interesiĝo ne estas plene satigebla pro la limigita laborpovo de s-ino Farukuoye. Ŝi ne nur instruas klase kaj koresponde, prelegas, informadas, preparas lernomaterialon, starigas biblioteketon, verkas referaĵon por la Universitato pri la nigeria lingvoproblemo kaj publikigas ĉiusemajne "Esperanto-leteron", sed ŝi finfine ankaŭ havas siajn "normalajn" devojn kaj taskojn.

Estas notinde, ke s-ino Farukuoye trovas la junularan kaj porkomencantan gazeton *Kontakto* tre utila pro ĝia facila lingvaĵo.

Fine de 1982 s-ino Farukuoye vizitis s-ron Oboh kaj surloke konstatis, ke lia "universitato" estas nur



privata elpaŝo sen oficiala agnosko kaj ŝajne ne laŭleĝa. Tio konvinkis ŝin, ke plej bone la esperantistoj sin distancigu de tiu iniciato, por eviti misfamon, kiam la ŝtato kontrolos. En aprilo aŭ majo ĉi-jare ŝajnis efektive okazi jam kontrolo.

Do ni nun devas apogi tutforte la agadon en Ondo, kie nun ekestas la kerno de serioza kaj vivipova nigeria Esperanto-movado.

Hans Bakker

Islamo, Irano kaj Esperanto

Nia revuo, kiel pluraj aliaj movadaj periodaĵoj, dediĉis relative multan spacon tra la lastaj jaroj al la subita grandskala laboro por Esperanto en Irano. Aliloke en ĉi tiu numero vi trovas informon, ke unusola Esperanta lernilo tie eldoniĝis en la daŭro de nur kelkaj jaroj en kvardek mil ekzempleroj. Eble nur la Movado en Ĉinio superas tiun iran rekordon. Montrigas intertempe, ke la komplika socia kaj politika transformiĝo de Irano dum la lastaj du aŭ tri jaroj ja ĝenas sed ne malebligas la Esperantan laboron tie. Nun kiel en la komenco, malantaŭ tiu tuta movada revolucio en Irano staras prof. d-ro M.H. Saheb-Zamani, kiu sukcese gvidas kaj defendas ĝin. Ĉi tie sekvas koncizigita versio de unu el liaj prelegoj en Teherano. Ni opinias, ke la teksto alportas sufiĉe da novaj starpunktoj kaj klarigoj pri la demando, kial la Internacia Lingvo trovas tiom da adeptoj en la kultura medio, kie ĝi antaŭe apenaŭ iam sukcesis enradikiĝi. Krome, la teksto de prof. Saheb-Zamani levas kelkajn fundamentajn problemojn lige al la Monda Komunika Jaro.

Oni demandas min interalie, kial mi elektis Esperanton? "Kial vi batalas por ĝia disvastigado, eĉ dum la vivodanĝera, suspektoplena tempo de milito kaj revolucio en Irano?" "Kian signifon Esperanto havas por vi persone, por Irano nacie, por la Tria Mondo kulture kaj por la mondo ĝenerale...?"

Por respondi tiujn demandojn iom kontentige, ni devas birdo-perspektive retrospekti la historion, minimume de antaŭ 26 jarcentoj.

La kristanismo, plej verŝajne, povis antaŭensalti ĉefe per elekto de unu okcidenta lingvo hindeŭropa. Ĝi elektis la grekan lingvon kiel superkomunikilon malfavore al siaj mezorientaj, originalaj, semidaj

lingvoj: la aramea kaj hebrea. La plej granda skismo en la historio de la kristana eklezio (en 1054), la dividiĝo en ortodoksan kaj katolikan, okazis i.a. pro la eniro de nova lingvo – la latina – kiel alia sankta lingvo, en la okcidentan katolikan kristanismon.

Ni ofte povas konstati la ekziston de iu komunika kern-elemento, nome lingvo, en grandaj movadoj, kiel la renesanco, reformacio, humanismo aŭ eĉ

en marksismo. La renesanco kaj humanismo ekestiĝis ĉefe per la reveno al la klasika greka lingvo, kaj al la latina de antaŭ Kristo. La reformacio i.a. signifas kontraŭstaron al la latina kaj apogon al naciaj lingvoj: denove radikalan ŝanĝon de la lingva komunikilo! La anglikanismo, kiel la protestantismo, ŝuldas grandparte sian sendependecon ankaŭ al la revolucia ŝanĝo de sia komunikilo, nome for de la latina. La marksismo, sen transvestado lingva de sia originalo – en la germana – kaj sen elekto de aliaj pli vaste uzataj lingvaj transmisiloj, praktike ne povus antaŭensalti orienten en Ruslandon kaj Ĉinion. Kaj ĉiuj ĉi kune kontribuis al alivizaĝigo de la kulturo kaj civilizo de la Okcidento specife kaj de la mondo ĝenerale.

Pli-malpli similan procezon spertis ankaŭ la budhismo, kiu komencis sian grandan venkon en la

Oriento post ekuzo de pli orientaj lingvoj (en la jaro 61 p. K. en Ĉinio, kaj en 552 p.K. en Japanio).

En la antaŭ-islama historio de Irano ekzistis ia kasta ordo kun siaj antaŭjuĝoj kaj baroj. Tiuj antaŭjuĝoj kruele baris lingve, religie kaj kulture la kontaktojn inter la kastoj. Nur la lingvo de la altaj kastoj havis skriban literaturon. La amasoj, laŭ la kasta regularo, ne havis posedrajton. Ili ankaŭ ne havis la rajton je edukado.



Multe pli revolucia rolo de Esperanto kiel internacia komunikilo: prof. d-ro M.H. Saheb-Zamani



En Irano antaŭ-islama ni ne konas iun veran scienculon, filozofon, poeton aŭ verkiston, escepte de kelkaj nomoj, kiuj sonas esti pli legendaj figuroj, krom la reala persono de la profeto Zoroastro (iam inter la 10a kaj 6a jarcento a.K.), Manikeo (215-271) — la irana Kristo-Budho kaj fondinto de la manikeismo — kaj Mazdako (6a jc) — la fondinto de la mazdakismo (irana socialismo). Irano tiama kulture, se ne tute mortinta, almenaŭ ŝajne estis steriligita. La verkoj de tiam estas ĝenerale religiaj, iomete epopeaj kaj mitologiaj. Tial la posta alveno de islamo signifis por Irano ne nur religion, sed ion multe pli — verdire, ian renesancon, eble eĉ la altkulturan ekburĝonon. Kaj tiu riĉa florado kultura elvolviĝis per mirinde radikala ŝanĝo de multaj lingvaj komunikiloj.

La granda venkoislama kaŭzis la falon de la kasta ordo en Irano (7a jc). La mezpersa lingvo (la palavia) aŭ la lingvo de la magoj kaj altaj kasto, kun sia ege malfacila ortografio, kvazaŭ mortis. Ĝin oni studas hodiaŭ nur pro filologiaj interesoj.

Kun la disfalo de la Sasanida Imperio (226-652) en Irano, falis ankaŭ la klasika aramea lingvo. Ĝi estis la internacia lingvo de la sasanida administracio mezorienta. Hazarde, la klasika aramea estis ankaŭ la sankta lingvo de la fondinto de manikeismo. Tiu lingva defalo mem kontribuis multe al la rapida morto de la manikeismo en Meza Oriento.

La lingvo de malavantaĝaj kasto iranaj (ĉ. 96% de la loĝantaro) fariĝis la fundamento de la nuntempa persa lingvo. Tiu lingvo kreskadis dum la islama epoko, kaj skribiĝis unuafoje per pli perfekta alfabeto. Ĝia aboco estis tute nova, kaj pliege simpla ol la duone ideografia skribado de la palavia. La persan alfabeton oni eltiris el la arabaj skribsignoj kaj fonetike konformigis al la sonsistemo de la persa lingvo.

La plimulto de iranaj kleruloj elektis la araban lingvon kiel sian supernacian komunikilon. Tiel ĉirkaŭ 70 procentoj el la verkistoj kaj scienculoj de la islama kulturo en la mezepoko estis iranaj aŭtoroj, kiuj verkis arablingve. Fame konataj nomoj kiel Aviceno (980-1037), Karazmio, Kajjamo, Gazalio, Birunio ktp., kiuj apartenas al la trezoro de la monda literaturo, estis irananoj de la islama periodo. Ili elektis la araban lingvon por pli vaste aŭdigi sin al la homaro. Kompreneble, la granda famo de Kajjamo estas pro liaj poemoj (ankaŭ tradukitaj Esperanten dufoje, de Waringhien kaj de Auld). Li poemis perse, sed siajn matematikajn kaj filozofiajn verkojn li skribis arabe. Irananoj, dum la tuta historio, nur unufoje, inter la 7a kaj 14a jarcentoj, havis la ŝancon montri al la mondo sian kulturan genion. Kaj tion ili faris, mirindege, ne per sia nacia lingvo, sed ja per iu tute fremda, semida lingvo — la araba! Iliaj verkoj estis legataj, laŭdataj kaj instruataj en la lernejoj de almenaŭ tri kontinentoj, de Hindio tra Norda Afriko ĝis Hispanio.

Multaj gestoj en La Chaux-de-Fonds



En la svisa urbo La Chaux-de-Fonds, la 21an de majo ĉi-jare okazis (aŭ estus devinta okazi) la unua kunsido de la Internacia Kunordiga Komitato por la Jubilea Jaro. Venis nur kelkaj reprezentantoj de la organizaĵoj, kiuj konsentis kunlabori. Esence, okazis tie multa gestado kaj plia vorta duelo inter la prezidanto de UEA Grégoire Maertens (dua de dekstre) kaj prof. d-ro Ivo Lapenna (unua de maldekstre). UEA — kaj precipe ĝia prezidanto — montris amason da pacienco kaj perdis tutan jaron (vidu nian junian n-ron de 1982) por trovi komunan jubilean lingvon kun prof. Lapenna. Ŝajnas, ke tia ege malfacilas. Feliĉe, la jubilea programo de UEA bone evoluas.

Irananoj kun perspektivoj internaciaj kredas, ke ili preskaŭ sole per iu lingvo universala povus denove partopreni brile en ia altkultura agado internacia – kvankam la celo ne estus tiel proksima, kaj la vojo ne tiel ebena, kiel oni dezirus.

Por eviti kelkajn eblajn miskomprenojn indus noti, ke la post-islama religia aŭ politika aspekto, kaj la dimensio kultura de Irano tute malsamas. Alivorte, la islamo enhavas tri dimensiojn – unue religian, due imperian aŭ politik-militarist-historian, kaj trie kulturen. La tri aspektoj de la islamo, kvankam interdependaj, tamen havas malsamajn vizaĝojn, evolu-stadiojn kaj sortojn ne troveblajn en la kristanismo aŭ budhismo. Tial ilin ofte kaj facile miskomprenas islamistoj kaj religioscienculoj okcidentaj. La tri dimensioj islamaj ne nur malofte intersubtenas, sed ofte kontraŭstaras unu la alian tre malkonstrue! Ĉi tie ni ne parolas pri la religia aspekto de la islamo, sed pri ĝia kultura dimensio, rezulte de ĝiaj neeviteblaj interreagoj kun invadema imperia profilo de la islama civilizo mezepoka. Do, la prezentado klopodas esti pli kultur-historia ol apologetika.

Komence, epizodo mallonga, politike ŝajn-printempa alvenis. Sed baldaŭ poste, tre malhela aŭtuno ekregis en Irano. Verdire, dum soci-politike malfeliĉa intertempo de du kruelaj ŝokoj de arabaj kaj mongolaj invadoj elleviĝis renesanco irana. Ja, meze de katastrofaj disfaloj, ruinoj, vespiroj, plorado, sango-verŝoj, incendioj, rifuĝoj kaj mizere altrudita vagabonda vivmaniero, la kultura fenikso irana mirakle naskiĝis!

Soci-lingvistike la islamo faris mirindan revolucion. Iranaj kleruloj verkis arabe pli ol ĉiuj kleruloj de aliaj islamaj nacioj. Kontraŭe, la amasoj iranaj absolute ne akceptis la araban lingvon. Sed la amasoj de Egiptio kaj ĉiuj nord-afrikaj landoj forlasis siajn proprajn lingvojn kaj asimilis la araban. Hispanio, preskaŭ simile al Irano, malgraŭ ĉirkaŭ okjarcenta regado de araboj en tiu lando, entute ne akceptis la araban kiel sian nacian lingvon. Tamen, iuj arab-devenaj hispanaj kleruloj impone kontribuis al la islama kulturo arablingve.

Simile al la interreagoj de la araba kaj ĝiaj homaj medioj, partoj de diversaj nacioj en la islama mondo forlasis sian propran lingvon kaj asimilis la turkan.

Mongoloj invadis Iranon (1256-1349) kaj akceptis la islamon. Tamen, ili ne puŝis sian propran, nek sian sanktan religian arab-islaman lingvon, sed ili akceptis la lokan persan lingvon, la lingvon de la venkitoj!

Nuntempe la arab-islama lingvo estas la sesa oficiala lingvo de Unuiĝintaj Nacioj. Kaj la urdua, alia frukto de islamo, klopodas tie oficialigi sin.

Tiuj ekzemploj aludas iom sufiĉe al aspektoj de la kvazaŭ-dialektika interagado de la islama civilizo kaj internacia komunikilo, pri kio oni ankoraŭ scias tre malmulte. Ni bezonas iun erudicie makro-sociologian lingvistikon por esplori tiun grandiozan komunikan fenomenon.

Tiu grandioza komunikativa vigleco atestas klare, ke io jam mankis – kaj ankoraŭ mankas – interkomunikile en la nuna mondo. Ja, ĉio ĉi montras profundan interhoman, kulturan bezonon al nova superkomunikilo universala. La islama civilizo siatempe pli-malpli kontentigis por si tiun bezonon. La

ĝusta diagnozo de tia interagado inter tiu bezono kaj ĝia ĝusta kontentigo donus al ni lecionojn, ege utilajn ankaŭ por Esperanto. Nu, ĉu en tia medio Esperanto havas veran ŝancon? Ĉu Esperanto povus plenigi interkomunikilan breĉon kaj krei novan senprecedencan interrilatadon? Ni estas konvinkitaj, ke tio eblas. La Tria Mondo senpacience atendas.

Pro kialoj similaj, aŭ eĉ identaj, Esperanto alportas por Irano la bonan mesaĝon, jam delonge sopiritan, pri la ebleco de alveno de iu nova renesanco humana kaj nia kunlabora kultura ĉeesto sur la internacia scenejo.

La ekzemplo de la islama civilizo klare montras, ke la afero ne estas tiel absoluta, malkompleksa kaj unudimensia kiel oni optimisme deziropensas. Kontraŭe, ĝi estas multdimensia kaj interdependas de malsamaj motivoj kaj kaŭzoj. Tial la problemo de interagado inter civilizo, kulturo kaj lingvo bezonas ankoraŭ pli zorgoplenan, erudician atenton kaj pristudon.

Esperanto por Irano – plej verŝajne samkiel por multaj aliaj landoj de la Tria Mondo – havas gravan signifon. Ni esperas, ke en la Monda Komunikativa Jaro ankaŭ la supre menciitajn temojn studos niaj esperantistaj kleruloj. Ekzemple la rolo de la araba lingvo en Hispanio povus esti taŭga studmaterialo por niaj samideanoj tie. Similaj studoj pri la rilato inter la sva-



Esperanta verkaro de prof. Saheb-Zamani: Pluraj liaj studoj en la persa eldoniĝis en miloj aŭ dekmiloj da ekzempleroj (vidu la paĝon 139) kaj la reputacio de la aŭtoro servas tiun de Esperanto en Irano.

hila kaj araba lingvoj en Afriko, aŭ la islamo kaj la urdua, povus esti valoraj temoj por nia kolegaro en Afriko kaj Azio.

Tiaj studoj certe povus pozitive ŝanĝi la komunikon mondkoncepton pri Esperanto ĝenerale. Tio montrus novan viveblecon de nia lingvo por hodiaŭa aplikado, kontribuis pli krear komprenon inter la triamondanoj kaj netriamondanoj. Laste, tiaj studoj povus – espereble – iomete moligi la negativajn voĉojn en la Esperanto-movado kontraŭ niaj, bedaŭrinde, ne facile kompreneblaj urĝaj postuloj pri scienco-teknika literaturo en Esperanto, pri koresponda esperantista universitato aŭ pri iu vere fizike, tutjare palpebla universitato Esperanta.

M.H. Saheb-Zamani

GAZETARO

Kial *Unesko-kuriero* ne aperas en Esperanto?

Tiun titolan demandon oni relative ofte starigas al nia redakcio, al unuopaj estraranoj aŭ al la Centra Oficejo. Ŝajnas tial, ke la demando meritas publikan respondon.

Kiel konate, *Unesko-kuriero* nun aperas en 27 naciaj lingvoj. Aperas krome ankaŭ kvar brajlaj eldonoj kvarfoje jare. Do temas entute pri 31 diversaj eldonoj de la ĉefa periodaĵo de la monda organizaĵo pri scienco, kulturo kaj edukado. Malgraŭ la jardekojn longaj rilatoj inter Unesko kaj UEA, la *Kuriero* ankoraŭ ne aperas en la Internacia Lingvo. Tiu demando estis jam plurfoje diskutita ĉe Unesko. La situacio nun estas tia, ke oni ne povas atendi, ke *Unesko-kuriero* aperos baldaŭ en Esperanto. Kial?

La problemo neniel estas ligita al ia oficiala starpunkto de Unesko pri Esperanto ĝenerale. Tra la pasintaj jaroj ni ofte ricevis rektan agnoskon de Unesko pri la kontribuo de Esperanto al la ĝeneralaj celoj kaj idealoj de Unesko. Tiu agnosko plurfoje venis ankaŭ de la plej altaj funkciuloj de la monda organizaĵo (pluraj renkontiĝoj de funkciuloj de UEA kun la ĝenerala direktoro de Unesko, lia partopreno en la inaŭguro de la 62a UK en Rejkjaviko ktp). Aldone al tio, Unesko dum la lastaj jaroj kelkfoje kunfinancis la aperon de siaj informiloj en Esperanto. Ĝenerale dirite, ne nur ke Unesko ne malakceptus Esperantan eldonon de la *Kuriero*, sed ĝi eĉ tre ĝojus, se tiu eldono povus realiĝi. La *Kuriero* estas la ĉefa informilo – kaj propagandilo – de la ideoj kaj entreprenoj de Unesko, kaj la organizaĵo certe strebas, ke tiuj ideoj kiel eble plej vaste diskonigu, en kiel eble plej multaj lingvoj.

En tia situacio la sola vera baro al la efektivigo de Esperanta eldono de *Unesko-kuriero* estas la financaj rimedoj, la manko de mono necesa por certigi la vivon de tiu eldono. UEA ne kredas, ke la Esperantomovado nuntempe povas garantii sufiĉan nombron da abonantoj, kiu ekonomie certigus daŭran vivon al Esperanta eldono de la *Kuriero*. Krome, lanĉo de plia ĝeneraltema periodaĵo sur la movada merkato kreus aldonan konfuzon de kiu certe malprofitus pluraj ekzistantaj Esperantaj gazetoj. Pensu, ekzemple, pri *Monato*, kiu nun, meze de sia kvara eldonjaro, ankoraŭ helpokrias kaj ne sukcesas ekvilibrigi siajn spezojn. La sorto de tiu specifa gazeto en la Internacia Lingvo memorigas nin, ke la esperantistaro pretas (kaj povas) multe pli facile subteni novajn iniciatojn vorte ol finance.

Do, se UEA aŭ iu alia en la Esperanto-movado pretus transpreni ĉiujn financajn riskojn pri Esperanta eldono de *Unesko-kuriero*, Unesko tuj – kaj kun ĝojo – konsentus pri tio.

Kiu tamen pagas la menciitajn 31 eldonojn de la *Kuriero*? Se Unesko trovas monon por tiuj 31 eldonoj, kiel okazas, ke ĝiaj rimedoj ne sufiĉas por unu plia versio de la *Kuriero*? La vero estas, ke Unesko mem pagas nur tiujn eldonojn de la *Kuriero*, kiuj aperas en la oficialaj laborlingvoj de la organizaĵo. Por la eldo-



**”Unesko-kuriero”
aperos en
Esperanto
kiam ni es-
tos pretaj
por
tiu evento.**

noj en la ceteraj lingvoj (kaj temas do pri dudeko da ili) Unesko liveras la redaktitajn tekstojn al la landaj Unesko-komisionoj, kaj la komisionoj mem (aŭ instancoj de ili nomitaj) pagas la kostojn de la tradukado, kompostado, teknika prilaboro kaj presado de tiuj nacilingvaj eldonoj. Ĉar la naciaj Unesko-komisionoj plej ofte estas registaraj instancoj, tio signifas,

ke la nacilingvaj eldonoj de la *Kuriero* fakte pagas la koncernaj registaroj (aŭ la impostata loĝantaro de tiuj landoj).

Antaŭ iom da tempo UEA diskutis kun Unesko la eblecojn eldoni en Esperanto jaran kolekton de la plej interesaj tekstoj, kiuj aperas en la *Kuriero*. Neniaj problemoj ĉe Unesko ankaŭ ĉi-rilate, kondiĉe ke ni en la Movado certigu la financajn rimedojn por tiu celo. Ĉu ni do havos tiujn rimedojn? Ĉu la esperantistaro interesiĝus pri *Unesko-kuriero* kiel jara periodaĵo?

KONGRESOJ

Fervojistoj en Belgio

Internacia Fervojista Esperanto-Federacio, la plej granda faka organizaĵo en la Movado, elektis por sia 35a Kongreso, kiu okazis de la 4a ĝis la 10a de junio 1983, la urbon Oostende, ĉe la bordo de la Norda Maro. "La rolo de la fervojo en la haveno Zeebrugge" estis la ĉefa faktemo. Por studi ĝin ĝisfunde, la kongresanaro de 435 homoj el 19 landoj veturis al tiu proksima haveno. En granda kinejo, survoje, oni haltis por komune rigardi filmon kun Esperanta komentario.

La tagon poste, en la kongresejo, sekvis detala prelego pri la rolo de la fervojo en la haveno. Post kariljona koncerto, kiun ludis Petro De Smedt, profesia kariljonisto kaj esperantisto, revenis surprize multaj kongresanoj en la salonon, por la "fakaj aktualaĵoj kun diskuto". Tiu programero trovas de jaro al jaro pli da intereso en la IFEF-kongresoj. Viciĝis prelegantoj pri: nova subtera fervojo en Helsinki (Finnlando), elektrizado de fervojoj (Danlando), nova fervojlinio al la flughaveno de Zürich (Svislando), novaj pasaĝervagonoj (Norvegio), poŝformataj komputiloj por la konduktoroj (Britio), subkanala fervoja tunelo (Nederlando), la luksa trajno "Rheingold" (FR Germanio) ktp. Vigla diskutado montris ne nur la intereson de la aŭskultintoj, sed pruvis ankaŭ, ke ili komprenis la vere teknikajn komplikaĵojn.

Unu tagon poste sekvis denove faka prelego, nome ripeto de la prezentaĵo el la UK en Antverpeno: "Kelkaj pensoj pri la stato de la fervojoj kaj de Esperanto kiel fervoja faklingvo". Ankaŭ tiu prelego trovis multan atenton. Ĉiuj prelegtekstoj estas riceveblaj ĉe s-roj: Lucien De Sutter (Chemin des Pins 4, B-

1180 Bruxelles) kaj Gernot Ritterspach (Alexander-Diehl-Str. 3, D-6500 Mainz), aldonante internacian respondkuponon.

La Terminara Komisiono de IFEF dufoje kunsidis en Oostende. El la seslingva fervoja leksikono de la Internacia Fervoj-Unio (UIC) jam 14 literoj estas finpretigitaj en Esperanto, dum la ceteraj estas tradukitaj kaj nun spertas la reviziadon.

Kompreneble, la kongresanoj devas por tia faka kongreso oferi sian libtempon. Do, estas bona kutimo, ke turismaj kaj distraj programeroj ne mankas. Okazis koncerto de fervojista blov-orkestro, urba ekskurso tra Oostende, muzika vespero kun folkloraj kantoj kaj dancoj, ekskurso al Bruĝo, distra vespero kun la konata Esperanta kantistino Ramona van Dalsem kaj ŝia Kvarteto Nostalgio, kariljona koncerto, prezentiĝo de la granda Nacia Orkestro de la Belgaj Fervojoj, ekumena diservo, kantvespero kun Tiana Moons ktp.

La gazetara konferenco rezultigis minimume 12 artikolojn kaj du radio-intervjuojn. Al la inaŭgura



solenaĵo venis la ĝenerala direktoro de la Belgaj Fervojoj, Emanuel Flachet. Ĉeestis ankaŭ la prezidanto de FICAIC (la internacia federacio de kultur-flegantaj unuiĝoj fervojistaj), la urbestro de Oostende kaj la prezidanto de UEA. Estis akceptita kongresa rezolucio, kiu ligiĝis al la Monda Komunika Jaro.

La kvarpersona Loka Kongresa Komitato, kaj precipe Lucien kaj Ady De Sutter, meritas altan estimon kaj sinceran dankon pro la streĉa kaj sukcesa laboro. La venontjara IFEF-kongreso okazos en Bulgario, kaj tiu de 1985 en Danlando. **G. Ritterspach**

Ni esploru la faktajn motivojn por lerni Esperanton!

La artikolo de Thomas A. Goldman pri la graveco de idealismaj motivoj por la lernado de Esperanto, publikigita en la aprila numero de *Esperanto* (p.65), konsciigis al mi, ke eble kelkaj legantoj fundamente miskomprenis miajn tezojn, aperintajn en la decembra numero de ĉi tiu revuo. Tio devigas min pli klarigi kelkajn punktojn. Mi limigas tiun klarigon al la plej gravaj punktoj, ĉar ne necesas – kaj ne eblas – prezenti la komplikajn kaj kompleksajn psikologiajn teoriojn (jes ja, pluralo!) pri motivado, enkadre de tia ĉi mallonga artikolo.

1) En la tezoj mi sekvis la lingvouzon de la psikologio, laŭ kiu la sencoj de la terminoj *utilo* kaj *bezono*


dua *utilo*". Ne identigu "kolektiva" kun "altruisma, idealisma", nek "individa" kun "egoisma"! Karl R. Popper en sia famkonata verko *The Open Society and Its Enemies* (La malferma socio kaj ĝiaj malamikoj) trafe refutis tiun falsan identigon, kiu estas tipa eco de totalismaj filozofioj.

Kial ajn, s-ro Goldman miskomprenas la terminojn interpretante ilin, kvazaŭ ili ekskludas spiritajn, idealismajn celojn. El tiu miskompreno logike sekvas lia erara opinio, ke miaj "unuaj kvin tezoj volas devolorigi la rolon de idealismo por la lernado de Esperanto". Brave refutante tiun senvalorigon, s-ro Goldman trafas sian propran eraran interpreton, sed ne miajn tezojn. Fakte mi samopiniis kun li, ke ankaŭ idealismaj motivoj gravas por la lernado de Esperanto. Ĝuste pro tio mi defendis la Internan Ideon kontraŭ ĝiaj malŝatantoj.

2) Nia ĝisnuna informado ofte preteratentas la faktajn bezonojn de la homoj.

Tial ni devas demandi: *Kiujn individuajn bezonojn – praktikajn kaj idealismajn – Esperanto povas nuntempe plenumi? Kiujn bezonojn, plenumebajn pere de Esperanto, la homoj, aŭ almenaŭ kelkaj cel-*

Usonaj esperantistoj ĉe akcepto en Stokholmo: Ĉu unu el la motivoj por lerni Esperanton estas la ebleco vojaĝi kaj proksimiĝi al aliaj landoj kaj homoj?



ne ekskludas spiritajn, idealismajn celojn; *bezono* estas preskaŭ samsignifa kun *motivo*.

Laŭ mia lingvosento ili ankaŭ en la eksterfaka lingvo rilatas ne nur al praktikaj aŭ materiaj celoj. Kaj en Esperanto kaj en la germana lingvo – en kiu la tezoj, antaŭ la reverko por ĉi tiu revuo, unue estis formulitaj –, oni ankaŭ ekster la psikologio senprobleme povas uzi la esprimojn *geistige Bedürfnisse* (spiritaj bezonoj), *immaterieller, ideeller Nutzen* (nemateria, ideala utilo).

Miskomprenigaj eble estis la esprimoj *superpersona utilo* kaj *persona utilo*. La intencita senco verŝajne estus pli facile kaptebla, se mi skribus "utilo por kolektivo, ekz. ŝtato, organizaĵo", respektive "indivi-

grupoj, fakte havas en grado sufiĉe forta por eklernigi ilin?

Jen la fundamentaj demandoj, antaŭ kiuj ni staras. Nur kiam ni sufiĉe precize scias la respondojn, ni povas plani kaj sekvi efikan informstrategion, anstataŭ perdi multe da mono, multe da laborhoroj en ofte vana klopodado.

Tiun scion donos al ni nek precizaj difinoj, nek sagaca teoriumado pri tio, kion la homoj deziras aŭ devus deziri, sed nur empiria esplorado. La plej modesta esplorado helpas nin pli ol la plej brila teorio.

3) En miaj tezoj 5 kaj 6 mi ne intencis doni kompletan liston de ĉiuj efikaj motivoj por lerni Esperant-

on. Tion mi eksplicite skribis. Do povas esti, ke mankas multaj, eĉ gravaj, praktikaj aŭ idealismaj motivoj. Mi volis pritrakti nur kelkajn, al kiuj rilatas konataj, ofte uzataj propagandaj argumentoj.

Ĉe tio mi esprimis opiniojn, rezultintajn el miaj personaj spertoj, kombinitaj kun psikologiaj konsideroj. Aliaj esperantistoj eble havas aliajn spertojn. Ĉu miaj spertoj estas reprezentaj kaj miaj opinioj ĝustaj aŭ ne, tion povas montri definitive – mi ripetas – nur empiria esplorado.

S-ro Goldman prezentis la tezon, ke "la motivo de homa ago estas pli ofte miksaĵo ol unikaĵo". La kunteksto supozigas, ke anstataŭ *unikaĵo* li volis diri *unuajaĵo* aŭ *unuspecaĵo*. Se premisi la ĝustecon de tiu interpreto, la psikologio plene akordas kun lia tezo. La faklingvo preferus jenan formulon: Unuopa homa ago plej ofte havas plurajn motivojn, ne nur unu motivon.

Mi supozas, ke ni malkovros, ke la motivaroj por a) eklerni, b) ellerni Esperanton kaj c) daŭre movadumi ktp. pli-malpli diferencas unuj de la aliaj, laŭforte kaj laŭkonsiste.

Mi ĝojus, se miaj artikoloj iomete instigus al serioza empiria esplorado (al kiu ankaŭ mi volus kontribui) pri la motivoj por eklerni Esperanton; tiam ili trafus sian celon.

Helmut Welger

Akademias studoj 1983 estas privata eldonaĵo

La saĝa recenzo de s-ro Wouter F. Pilger en la aprila revuo pri la *Akademias studoj 1983* de Rüdiger Eichholz ricevis de la redaktoro la klasifikon: "kelkaj malagrablaj demandoj al la Akademio kaj la akademianoj". Tial mi volas informi, ke la Akademio de Esperanto laboras per skribaj voĉdonoj kaj respondecas nur por tiuj decidoj aŭ verkoj, kiujn la plimulto de ĝiaj membroj akceptis laŭ maniero priskribita en la statuto. Tute alie estas pri akademianoj, kiuj kompreneble rajtas opinii individue kaj aŭdigi sin private. Liberaj estas ankaŭ la vortumadoj kun uzo de la radiko *akademi-* nur la propra nomo "Akademio de Esperanto" estas escepto. Tiel do eblis, ke akademiano Eichholz publikigis *studojn 1983* kaj elstarigis ilin per la adjektivo *Akademias* (majuskle ĉar komencvorto). Mi koncedas, ke tio povas kaŭzi tiun ĉi miskomprenon, kiu instigis la redaktoron fari sian averton.

Certe kontribuis al tiu nur laŭŝajna oficialeco, ke s-ro Eichholz aldonis voĉdonilojn, kiujn ĉiu donacricevinto aŭ aĉetinto de la libro povas resendi. Li laboras per tiu metodo por esplori la akceptopretecon de la parolantoj de Esperanto pri terminproponoj. El tio

li formulas sian privatan opinion, kaj tion li enportas en la Akademion, kie ĝi estas valora bazo por plulaborado. La legantoj de *Esperanto* do bonvolu ne timi, ke tiel – sur hazarda vojo – la Akademio plenumas siajn laborojn.

La konsilo de la recenzanto: konscii, ke "Esperanto ekzistas kaj ke ĝiaj propraj normoj kaj reguloj estas ĝia forto", estas unu el la kolonoj, sur kiuj la nuna Esperanto staras. Mi plene aliĝas al tiu postulo. La recenzo de s-ro Pilger estas valora kontribuo al pluraj aktualaj diskutoj ankaŭ en la Akademio.

Pri ĉi tiu "letero de leganto" la Akademio de Esperanto ne voĉdonis, do ĝi ne estas oficiala, tute same kiel la *Akademias studoj 1983*. Sed mi pludonis klarigojn pri la labormaniero de la Akademio laŭ ĝia statuto kaj informis pri ekzistantaj tendencoj.

D-ro Werner Bormann

ĝenerala sekretario de la Akademio de Esperanto

NOTO DE LA REDAKTORO: Estis al ni tute klare, ke *Akademias studoj 1983* ne estas oficiala eldonaĵo de la Akademio. Ni tamen volis, ke la Akademio mem (aŭ ĝia funkciulo) diru tion, kion d-ro Bormann komunikas ĉi-supre. Kompreneble, ke la akademianoj rajtas je propra privata opinio, tian rajton havas eĉ la redaktoroj. Tiu rajto tamen havas siajn limojn, ĉar ĉia distanciĝo de "privataj" elpaŝoj rikoltas nur tre supraĵan efikon ĉe la publiko. Tial la "privata" kvalifiko de la redaktoro pri la Akademio kaj akademianoj celis reeĥi iom pli ĝeneralan maltrankvilon pro kelkaj elpaŝoj en *Akademias studoj 1983*. Ni volis, ke la Akademio aŭ akademianoj aŭdiĝu tiurilate, kaj tio jen komencas okazi. Intertempe atingis nin ampleksa teksto de d-ro Albault, nova prezidanto de la Akademio. Ĝi aperos en nia oktobra n-ro.

Esperanto-instruistojn Francio ne edukas

Vi aperigis, en *Esperanto* (n-ro 927, marto 83) tre interesan artikolon titolitan "Esperanto en ĉinaj altlernejoj". Koncerne Francion, vi skribis ke ĝi havas sisteman altlernejan edukadon de la instruistoj en Esperanto. Verŝajne vi scias, ke SAT-Amikaro multe klopodas ĉe la franca registaro pri voĉdono de leĝo favora al la instruado de Esperanto en la lernejoj. Pri tio aperis informo en nia revuo de marto 1983.

Tre bedaŭrinde, en la nuna stato de niaj diskutoj kun la oficialaj instancoj, ni ne antaŭvidas akcepton de la franca Edukministerio starigi sistemon de Esperanto-instruado en la ĝeinstruistaj seminarioj francaj. Eble tia sistemo ekzistas en Bulgario, Hungario kaj en la tri baltaj respublikoj de Soveta Unio sed tute ne en Francio.

R. Grandière

prezidanto de SAT-Amikaro

Kiu estas kaj kiu estras UEA?

Kvankam ni iom principe kontraŭas la anonimecon, kiam oni volas diskuti gravajn demandojn, ni faras escepton ĉi-foje kaj publikigas nesubskribitan tekston, kies aŭtoro ja estas konata al la redakcio. La aŭtoro de la sekva teksto grandparte eraras pri pluraj siaj taksoj kaj starpunktoj, sed li aliflanke ja levas kelkajn interesajn demandojn: Kiel la nuna sistemo stimulas la landajn asociojn havi pli da individuaj membroj en UEA? Ĉu la landaj asocioj (precipe tiuj kun malmultaj individuaj membroj) ne povus pli bone informi pri la laboro de UEA? Ĉu ĝenerale ne eblas intensigi la informfluan inter la landaj asocioj kaj UEA? Ni provos prinoti plion fine de la artikolo.

En *Esperanto*, n-ro 3/82, aperis artikolo de R. Corsetti sub la titolo "Kiu estas UEA?" En ĝi la aŭtoro konkludas, ke UEA estas "la homoj organizitaj en la landaj asocioj kaj la individuaj membroj". En la sama artikolo li skribas: "UEA ja havas la devon enmiksiĝi en la internajn aferojn de la landaj asocioj, kiam ĉi tiuj nekontentige funkcias, kiam ilia membronombro restas 'stabila'..." Tiujn du vidpunktojn mi komentos.

Unue, mi konstatas, ke UEA estas *unualoke* la homoj organizitaj en la landaj asocioj. Ĝis 1922 UEA ekzistis kaj prosperis sen landaj asocioj. Due, mi provos konstati, ĉu enmiksiĝo de UEA en la aferojn de iu landa asocio estas necesa. Por respondi al tiu demando kaj por motivi mian konteston pri la unua punkto, mi utiligos la artikolon "Brazilo unualoke" sur la paĝo 48 en la sama, supre menciita, revuon. Ni vidas tie en du kolumnoj la listojn de po dek landoj kun la plej granda nombro de individuaj kaj de aligitaj membroj de UEA. Ni vidas, ke Brazilo per siaj 639 individuaj membroj en 1981 okupas la unuan lokon en la maldekstra kolumno, kaj la dekan en la dekstra. Pro tio ĝi havas nur du komitatanojn en UEA. Aliflanke, Bulgario, kiu tute mankas en la listo de la landoj kun la plej multaj individuaj membroj (ĝi havis en 1981 nur 84 tiajn membrojn en UEA), pro la fakto ke ĝi okupas la unuan lokon en la listo de la landoj kun plej multe da aligitaj membroj – reprezentigas per kvin komitatanojn en UEA. Ĉu tio estas normala kaj justa?

5 110 bulgaraj aligitaj membroj, ne ricevante la Jarlibron kaj la revuon *Esperanto*, nenion scias pri UEA. La demando estas, ĉu ili ne deziras fariĝi individuaj membroj kaj kial ili ne faras tion. Bulgara Esperantista Asocio (BEA) jam dum pli ol dek jaroj ne registris ŝanĝon de la nombro de siaj aligitaj (aso-

ciaj) membroj en UEA: ĉiam estas pli ol 5 000 aligitaj, malpli ol 100 individuaj, kaj inter 50 kaj 60 delegitoj en ĉ. 25 lokoj – preskaŭ ĉiam la samaj homoj. Stabila nombro de membroj? Ne! Okulfrapa stagnado. Kaj, kiu kulpas pri ĝi? Certe ne kulpas la aligitaj membroj mem.

Ekde 1965 la ĉefdelegito en Bulgario estis la sama homo. Dum 14 jaroj (1963-1980) la sama persono estis ankaŭ la ĉefredaktoro de *Bulgara esperantisto*. En tiu gazeto dum tiu tuta periodo neniam aperis ia ajn invito aŭ alvoko al la legantoj fariĝi individuaj membroj de UEA.

Leviĝas la demando, kial Bulgara Esperantista Asocio ne klopodas plimultigi siajn individuajn membrojn en UEA? Respondo eventuale estas la fakto, ke BEA ne bezonas tion, ĉar la nombro de ĝiaj aligitaj membroj certigas al ĝi kvin komitatanojn.

Se la nombro de la komitatanoj en UEA estus dependa kaj proporcia al la nombro de la individuaj membroj, tiam la afero estus tute alia. La komitatanoj decidus – kiel skribas Corsetti –, ĉu en la venonta laborperiodo oni dediĉu sian energion por persvadi Uneskon aŭ por persvadi kelkajn pliajn milojn da neesperantistoj iĝi komencantoj. Se ankaŭ estonte la nombro de la komitatanoj dependos de la aligitaj (ne de la individuaj) membroj, povus okazi jeno: Ĉina Esperanto-Ligo, kiel aliĝinta landa asocio kun cent mil membroj (vidu en *Esperanto* de aprilo ĉi-jare, p.62), delegos cent komitatanojn al UEA. Fantaziaĵo? Ne! Realiaĵo, kiu nun estas praktikata en UEA. Laŭ mi, la plej grava parto de UEA estas la individuaj membroj, kaj la nombro de komitatanoj devus esti proporcia al la individua membraro en unuopaj landoj. Krome, pri gravaj demandoj devus decidi ne la Komitato sed denove la individuaj membroj per skriba voĉdono. Tio estus vera kaj senpera demokratio.

I.M.

REDAKCIA NOTO: Ĉu la ĉi-supra teksto estas grandparte fantaziaĵo? Jes! Ĝi montras bazan nekonon de la nuna Statuto de UEA, kiu en sia artikolo 23 preskribas jenon: "Neniu landa asocio rajtas pli ol ses komitatanojn entute." Oni do ne timu de la ĉinoj, de bulgaroj eĉ malpli. La demando, ĉu al UEA sufiĉas ĝia individua membraro, solviĝis antaŭ 50 jaroj (en 1933) per la konata Interkonsento de Kolonjo. Kial la bulgaroj ne reklamas la individuan membrecon en UEA? Nu, ĉar UEA ne akceptas bulgarajn levojn sed postulas 42,50 guldenojn por ĉiu bulgara individua membro. BEA, aliflanke, disponas nur pri strikte limigita sumo da guldenoj. Necesas do ŝanĝi la Mondan Ekonomian Ordon. Ĉu signo de "vera kaj senpera demokratio" estas ankaŭ la aperigo de iom fantaziaj opinioj kaj elmontrado de ies neinformiteco? Ni neniam opiniis tiel, sed se vi kredas la malon, ĝuu la supran tekston almenaŭ ĉi-foje!

Kiom gravas la Esperanta literaturo?

Leopoldo Henrique Knoedt, aŭtoro de pluraj aklame akceptitaj Esperantaj tradukoj (i.a. "La luzidoj"), maltrankvilas pro la ekonomiaj malfacilaĵoj, kiujn lastatempe spertas kelkaj periodaĵoj (ekz. "Monato") kaj eldonejoj de Esperantaj libroj. "Ĉu eblas publikigi ĉi tion en 'Esperanto', por iomete skui niajn karajn samideanojn?", skribas Knoedt el Brazilo. Jes, eblas, des pli ke estas malfacile ne samopinii kun la sekva teksto.

Unu el la premisoj por vivanteco de lingvo, ĉu etna, ĉu planita, estas la ekzisto de kulturo en ĝi kreita. Ankaŭ Esperanto sukcesis trapasi tiujn preskaŭ cent jarojn nur ĉar ĝia iniciatinto donis al ĝi kulturen bazon. Tiu konsistas ne sole en la ebleco kaj celo de senpera kontakto inter homoj parolantaj malsamajn lingvojn, sed same de la tuj enkondukita literaturo. Ĉar literaturo estas ja unu el la pilieroj de kulturo. Ĉiu popolo, portanto de propra lingvo, havas sian apartan kulturon, se ne skriban, almenaŭ buŝan. Literaturo ludas elstaran rolon en la transdono de kulturo de unu generacio al alia; komence buŝa pere de sorĉkantoj, proverboj, mitoj, legendoj. Poste evoluanta al la diversaj formoj de poezio, kantata aŭ ne, kaj de prozo.

Ĉar Zamenhof prenis sian vortostokon el la okcidenteŭropaj lingvoj, la vortoj de la nova lingvo kunportis signifonuancojn kaj ideoasociojn de multaj popoloj. Tial Esperanto naskiĝis jam en ora lulilo. Ĝi povis ĉerpi el la tuta greka-romia tradicio. Iom post iom aldoniĝis elementoj de ĝia propra kulturo, fontanta el realaj skribaj kontaktoj inter malsamlingvanoj kaj pli malofte el parolaj komunikoj dum internaciaj renkontiĝoj. Sed tre baldaŭ niaj verkistoj lasis liberan kurson al sia imagopovo, kreante ankaŭ nereajajn situaciojn de la esperantista vivo en siaj rakontoj, noveloj kaj skeĉoj. Sed precipe ili invadis la kampon de la poezio, ofte realigante tiamaniere siajn latentajn kapablojn kaj aspirojn. Aliaj riĉigis la ling-

vojn pere de tradukoj, por kiuj necesis krei vortojn ankoraŭ ne ekzistantajn, aŭ novajn aŭ – esplorante la latentajn eblecojn – troviĝantajn en la lingvo mem. Ĉiuj kune ili donis ĉiam pli solidan bazon al la Esperanta kulturo kaj levis la lingvon al la plej alta ŝtupo de evoluo, transformante ĝin en perfektan esprimilon de ĉiu homa penso kaj sento.

Pro tio ni ne povas ne konsideri la literaturon unu el la plej gravaj faktoroj de la neŝancelebla pozicio akirita de Esperanto. Se ne estus pro ĝia kulturo, subtenata ĉefe de la literaturo, Esperanto certe estus fariĝinta nur unu el tiuj multaj projektoj de internacia lingvo, funge aperintaj dum la lasta jarcento.

Nun ni sincere demandu nin, kiel nia literaturo kapablis tiel oportune evolui. La respondo tuj frapos nian frunton: tio okazis sole ĉar niaj verkistoj trovis ŝancojn publikigi, kion ili verkis. William Auld tion klare diris dum la UK en Brazilo. Kiel juna homo li havis la elekton verki en la angla aŭ en Esperanto.


Ĉar por li ekzistis pli da ebleco disvastigi siajn verkojn en Esperanto, li elektis verki en la Lingvo Internacia prefere ol en sia etna lingvo.

Sed tiu ŝanco, ke niaj verkistoj povu daŭre publikigi siajn kreaĵojn, pliperfektigi la lingvon, subteni kaj evoluigi la internacian kulturon, eblos sole se la eldonistoj sukcesos transvivi la nunan aparte malfacilan ekonomian periodon. Tiuj eldonistoj – ili mem esperantistoj kaj idealistoj – certe ne celas grandajn profitojn, kiel iliaj kolegoj de la cetera mondo, kiuj

akceptas manuskripton nur kiam ili flaras, ke ĝi fariĝos "furoraĵo". Tamen almenaŭ la kostojn de la investoj ili volas rehavi, alie ili ne eltenos kaj devos ĉesigi sian aktivadon.

Por ke la eldonista agado daŭru kaj tiamaniere ebligu la propran pluekzistadon de Esperanto kiel kultura fenomeno, necesas ke ĉiu unuopa esperantisto alportu sian grajnon, abonante almenaŭ unu revuon kaj fojfoje aĉetante almenaŭ unu libron. Jam ekzistas sufiĉe da elekteblo por ĉiuj gustoj: de la junularcela tra la informa, politika, distra, ĝis la plej rafinita beletra kaj plej serioza faka literaturo. Por tiuj, kiuj sin dediĉas al la instruado de la lingvo, la konstanta kontakto kun nia literaturo estas nepra kondiĉo por la sukceso de ilia laboro.

L.H. Knoedt



Leopoldo Henrique Knoedt

Sciencfikcie pri nuno

La fermita urbo, István Nemere (1944). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 128p. 21cm. ISBN 963 571 075 5. Prezo: 13,80 gld.

La blinda birdo, István Nemere. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1983. 118p. 20cm. ISBN 963 571 104 2. Prezo: 15,00 gld.

La fermita urbo ensceniĝas sur du niveloj: surtere estas la 26a jarcento, subtere la 15a. En la 15a jarcento rolas maizkulturantoj, ŝafoj, kunikloj kaj maljuna viro, kiu memoras pli bonan mondon supre, kien anĝeloj portos tiujn, kiuj en sia vivo kondukis bone. Estus entute trankvila vivo, se ne iam alvenus ĉefpastro kaj princo, kiuj dungis pastrojn kaj pafarkajn soldatojn, por batali pri regado de la urbo. Kaj strange: neniam pluvas, ĉiam regas la sama vetero, kaj la lumo venas tuttage ekzakte desupre, nemoviĝante. La suno ne subiras, ĝi subite estingiĝas. Kvazaŭ elŝaltita.

Iom post iom la heroo malkovras tiun fermitan urbon. Ĝi estas sekreta punkolonio, kies loĝantojn oni malmemorigis pri la antaŭo. Ilia mikrosocio servas kiel observ-objekto por psikosociologia instituto en la 26a jarcento. Tamen la potenclukto, la murdoj de soldatoj kaj partizanoj ne estis planitaj. Kiu iniciatis tion? Kaj kial neniu malhelpas? Post kiam la heroo trovis sekretan enirejon, akcele evoluas kaj kulminas la batala eksplodo de la kaŝurbo.

Nemere rakontas en rapida intermito de la niveloj, kaj nur post multaj paĝoj klariĝas la ligiĝo de la scenejoj. Nur tre malfrue solviĝas la alligo de ia intera nivelo de raditelefonaĵoj. Kvankam rolas aertaksioj, interplanedaj flugoj kaj radipistoloj, la romano apenaŭ apartenas al la naturscienca fikcio, sed al la socia sciencfikcio.

"En lando, kiun oni ne rajtas forlasi kiam ajn sen malhelpo fare de la registaro – oni reguligas kaj kontrolas ankaŭ ĉiujn aliajn aspektojn de la vivo de ŝtatoj, oni direktas ĉion laŭ kontraŭhomaj ideoj; do tie oni jam ne estas liberaj" (p.66). En *La blinda birdo* Nemere rakontas, pri tute nuntempaj cirkonstancoj, pri nigrahaŭta verkisto, kiu senpermeso forlasis Sudafrikon kaj en internacia kongreso raportis pri rasa subpremo. Reveninte, li estas arestita. Sveda kongresamiko lia flugas al Sudafriko por enketi pri lia sorto. Li mire ekkonas landon, kie eblas aresti sen proceso, kie la polico mensogas eĉ pri la ekzisto de arestitoj, kaj kie ĉiu konsilas lin tuj hejmenvojaĝi. Kontaktinte la liberigan fronton, la svedo fine povas kontribui al perforta liberigo kaj eskapo de sia amiko. Atinginte sekurejon, la nigra verkisto tamen mortas

pro la sekvoj de mallibereja torturo. La svedo ekcerbumas pri la prezo de lia liberigo: pluraj mortpafitaj policianoj kaj partizanoj. "Kaj ne ĉiu povus fuĝi. Oni devas ŝanĝi la kondiĉojn, por ke ĉiu povu vivi trankvile" (p.98). Tiuj pensoj rekte kondukas al cerbumado pri liberigo kaj revolucio. "Sed ĉiu revolucio fiaskos tiam, kiam ĝi... venkas" (p.111).

Nemere uzas fikciajn geografiajn nomojn, sed estas pli ol klare, ke li direktas sian kritikon kontraŭ Sudafriko. Tamen la bazaj ideoj de la romano ne limiĝas al rasapartigo, sed temas pli ĝenerale pri ŝtata maljusteco. Kaj la fikcia situigo de la okazaĵoj permesas kompreni tiujn ideojn, el kiuj mi citis la por mi plej cerbumigajn, kiel celitajn al la reĝimoj de ne nur unu lando.

En ambaŭ romanoj la leganto ekkomprenas reton de agoj kaj kontraŭfaroj nur paŝon post paŝo, kune kun la ĉefrolanto. Tiu rakonta tekniko, enhavanta ankaŭ oftajn scenŝanĝojn, prezentas ambaŭ temojn en interesa, vigla, atentokapta maniero. Ĉiuj gravaj rolantoj estas viroj, kion do eĉ la socifikcio ne ŝanĝas. Nemere eluzas la esprimivon de la lingvo multvarie kaj trafe, escepte de aro da demandoj sen ĉu. La dialogoj estas en elstara parola stilo.

Klaus Schubert (FR Germanio)

Kontraŭmilite

Siberio en neĝo, Denzi Kurosima (1898-1943). El la japana trad. M. Miyamoto (1913). Kyôto: L'Omni-buso, 1982. 88p. Ilus. 18cm. Prezo: 17,10 gld.

La okcidentaj landoj estas modsekvantaj landoj. Tio validas ne nur pri vestoj aŭ hararanĝoj, sed ankaŭ pri ideoj kaj ideologioj. De kelkaj jaroj estas tre laŭmoda la "Tria Mondo", kaj se oni vere apartenas al la intelekta elito de la "Unua Mondo", oni ne rajtas ne esti triamondisto, aĉeti ekz. ĉiliajn diskojn kaj hindajn vestojn kaj, veturante per malmultekosta araba petrolo, babili pri la neceso de dialogo inter industriaj landoj kaj tiuj produktantaj krudmaterialojn.

Nuntempe abrupte refariĝis laŭmodaj paco kaj pacmovadoj. Dum ankoraŭ iom da tempo la ĝusta ideologia mikso fare de avangardaj okcidentanoj estos ekologio kaj paco, priŝprucita de iom da neraciecaj individu-centraj filozofioj.

En ĉi tiu klimato eble la verko *Siberio en neĝo* devus trovi multajn legantojn, ĉar ĝi estas kontraŭmilita kaj kontraŭarmea. Se tiuj avangardaj junaj okcidentanoj sukcesos superi siajn profundajn psikologiajn barojn, kaj konsideri, ke ankaŭ japanoj estas homoj kun sentoj tute similaj al tiuj de, ekzemple, francaj aŭ germanaj soldatoj, se oni sukcesos interesiĝi dum iom da tempo pri "malsama" kulturo kaj venki la barojn de kelkaj japanaj nomoj kaj mezurunuoj, ili havos aliron al tre freŝa verketo en tre flua Esperanto.

La okazintaĵoj rilatas al milito, kiun pluraj landoj forviŝis el sia memoro, tio estas la klopodo sieĝi Sovetan Union tuj post la revolucio.

Interesaj estas ankaŭ la bildoj, kiuj iel kopias laŭ mia impresado bildojn, aperintajn en pluraj eldonoj de la same kontraŭmilita, multe pli fama *La brava soldato Ŝvejk*.

Renato Corsetti (Italio)

Mi ŝatus pli da ekzemploj

Manlibro pri ĵurnalismo, de Judith Junger kaj Stefan Maul. Antwerpen/La Laguna: TK/Stafeto, 1982. 80p. Ilus. 21cm. ISBN 90 6336 051 0. Prezo: 13,80 gld.

Vi foje verkas artikolon por kluba bulteno aŭ por revuo de landa asocio. Kiel lertiĝi? Aŭ eble vi redaktas ilin. Kiel do atingi profesion nivelon? Okaze vi intencas informi ĵurnalistojn pri Esperanto. Tiam ne eblas multa sukceso, se vi ne bone konas la preferojn de la profesiuloj. Kaj jen la *Manlibro* donas praktikajn konsilojn sen ĝena teoriumado.

Kolektu informojn sur apartaj slipoj kaj faru el ili skeletan antaŭplanon de artikolo – jen unu el tiuj konsilo-eroj, kiu faciligis la verkadon ankaŭ de ĉi tiu recenzo.

La rezonado en la *Manlibro* pri nepraĵoj ĉe revuo de landa asocio servas kiel bona kontrolilo. Mi multe ruĝkrajonis la paĝon, ĉar ankaŭ mi redaktas tian revuon en Japanio. La libro emfazas la rolon de tiaj revuoj kiel fenestroj el kaj al "la ekstera mondo": la internacia Esperanto-movado kaj neesperantista publiko. El tia starpunkto nature venas ĝiaj pledo kaj

konkretaj konsiloj, por ke Esperanto-gazetoj estu redaktitaj kvalit-konscie, tiel ke oni povu utile prezenti ilin al neesperantistoj.

Ĉar ni estas en la Monda Komunikado Jaro, esperantistoj havas pli da ŝancoj por logi ĵurnalistojn al siaj aranĝoj mond-komunikemaj. Tamen, kiel logi? La instrukcioj en la *Manlibro* estas kvazaŭ "recepto" de endoj kaj ebloj flanke de esperantistoj – de ekkontaktado ĝis gazetara konferenco. Obeinde, ĉar unu el la kunaŭtoroj, S. Maul, estas ĝuste profesia ĵurnalisto.

Tamen la komencaj ĉapitroj pri diversaj specoj de komunikiloj kaj de artikoloj estas tro tedaj. Forigu ilin en la dua eldono. Sufiĉus tiurilate pli bona "terminareto" fine de la libro.

Anstataŭe mi ŝatus legi pli da ekzemplaj prezentoj, pri kiel estiĝas artikolo aŭ numero. Leganton multe interesus taglibra rakonto pri redaktora laboro, "horlibra" prezento, pri kiel verkiĝas difinita teksto.

Necesas pli da paĝoj por doktrine prezenti "monatistimon", se mi rajtas tiel nomi, la avantaĝon utiligi esperantistan reton por ĵurnalismaj celoj. La donitaj fuŝo-ekzemploj de la usona agentejo AP amuzas, tamen ne faras la tutan aserton de la aŭtoro pozitiva kaj konvinka.

Ĉar plejparto de Esperanto-redaktoroj laboras por tre etaj periodaĵoj, interesus ilin ia kompara studo de tiaj revuoj. Oni do atendu tion en la dua numero de la "Praktika libroserio de *Monato*", kies unua numero estas ĉi tiu *Manlibro*.


Yukio Izumi (Japanio)

Kompara scienca studo pri vortfarado

Plansprache und Nationalsprache; Einige Probleme der Wortbildung des Esperanto und des Deutschen in konfrontativer Darstellung, de Detlev Blanke (1941). Berlin: Akademie der Wissenschaften der DDR. Linguistische Studien, Reihe A, Arbeitsberichte 85. Zentralinstitut für Sprachwissenschaft, 1982. 161p. 20cm. Prezo: 10,20 gld.

Kiel indikas la titolo, la libro komparas vortfaradon en Esperanto kaj la germana lingvo. Blanke distingas inter tri tipoj de vortfarado: vortkunmetado, derivado (uzo de sufiksoj), uzo de prefiksoj.

En vortkunmetoj de du morfemoj, la lasta morfemo estas nomata *ĉefelemento*, kaj la alia morfemo estas nomata *flankelemento*. Blanke traktas diversajn klasojn de vortkunmetoj laŭ la vortospeco de la ĉefelemento kaj la vortospeco de la flankelemento. La ĉefelemento povas esti substantivo, adjektivo aŭ verbo, la flankelemento povas esti substantivo, adjektivo, verbo, numeralo, pronomo, prepozicio, adverbo. Blanke aparte pritraktas ĉiun el la diversaj



kombinaĵoj de ĉefelemento kaj flankelemento, kaj por ĉiu el tiuj kombinaĵoj li donas Esperantajn kaj germanlingvajn ekzemplojn.

Blanke akceptas la plej multajn vortkunmetajn regulojn de *PG*, *PAG* kaj la Akademio, sed ne ĉiujn. Li konvinke argumentas kontraŭ la regulo de *PG*, *PAG* kaj la Akademio, ke substantiva ĉefelemento ĉiam substantivigas la flankelementon. Blanke aldonas regulon, kiu permesas kunmeton de substantiva ĉefelemento kun adjektiva epiteto kiel flankelemento. Li notas, ke la uzo de tiaj kunmetoj estas kreskanta malgraŭ la akademia malpermeso.

La morfemoj kiujn lernolibroj ordinare nomas *afiksoj* (*prefiksoj* kaj *sufiksoj*) estas en *PG* kaj *PAG* dividitaj en du klasojn *afiksoidoj* (*prefiksoidaj* kaj *sufiksoidoj*) kaj *afiksoj*. Oni parolas pri afiksoido, kiam ĝiaj kombinaĵoj kun vortoj povas esti klarigataj per la ĝeneralaj reguloj de vortkunmetoj. Ankaŭ Blanke distingas inter afiksoj kaj afiksoidoj, sed lia divida linio inter afiksoj kaj afiksoidoj ne estas la sama kiel en *PG* kaj *PAG*, ĉar liaj reguloj de vortkunmetoj iom diferencas de la reguloj de *PG* kaj *PAG*.

Ŝajnas al mi, ke la libro de Blanke estas bona suplemento al *PG* kiam temas pri vortfarado.

La kombineblo de vortoj estas multe pli granda en Esperanto ol en la germana lingvo. Blanke donas multajn ekzemplojn de vortkunmetoj en Esperanto, kiujn oni ne povas esprimi per unu sola vorto en la germana lingvo. Blanke notas, ke Esperanto uzas siajn eblojn por vortfarado kun multe pli granda reguleco ol faras la germana lingvo.

Vortkunmetoj povas esti pli aŭ malpli travideblaj. Ankaŭ en Esperanto troviĝas vortkunmetoj kun malgranda travideblo, sed en multe malpli granda nombro ol en la germana lingvo.

Unu komplikaĵo de la germanaj vortkunmetoj estas, ke oni ofte enmetas interan elementon (*Fugenelement*) inter flankelemento kaj ĉefelemento. Blanke referencas al artikolo kiu pritraktas 17 diversajn interajn elementojn.

Blanke pritraktas la jenajn afiksojn kaj afiksoidojn en Esperanto: *-o*, *-a*, *-i*, *-eco*, *-ejo*, *-ema*, *-igi*, *-iĝi*, *ek-*, *mal-*, *sen-*. Por ĉiu el ili li prezentas la respondajn vortformadojn en la germana lingvo. La plej multaj afiksoj kaj afiksoidoj en Esperanto estas unusencaj, sed al ĉiu el ili respondas diversaj tipoj de derivaĵoj kaj kunmetoj en la germana lingvo. Blanke ekzemple montras, ke al la Esperanta sufiksoido *-ema* respondas la germanaj sufiksoj *-ern*, *-haft*, *-ig*, *-isch*, *-lich*, *-sam*. Al la Esperanta prefikso *mal-* respondas la germanaj prefiksoj *un-*, *ab-*, *ent-*, *ver-*. Aliflanke la germanaj sufiksoj havas po plurajn signifojn. Ekzemple al la germana sufikso *-lich* respondas la Esperanta sufikso *-a* kaj la Esperantaj sufiksoidoj *-ema*, *-ebla*, *-inda*, *-eta*.

Alia komplikaĵo de la germanaj derivaĵoj estas, ke la vorto al kiu oni aldonas sufikson kelkfoje ricevas umlaŭton, kelkfoje ne, kaj ke en kelkaj derivaĵoj okazas aliaj ŝanĝoj de la baza vorto.

Blanke notas, ke sistema komparo de nacia lingvo kun Esperanto povas esti de intereso por diversaj problemoj de teoria kaj aplika lingvoscienco. Mi mencias unu uzon de tiaj komparoj, kiun Blanke ne mencias. La komparo de vortfarado en nacia lingvo kaj Esperanto klarigas parton de la facileco de lernado de Esperanto kompare kun la lernado de fremda nacia lingvo. La plej multaj homoj ne konscias pri la malreguleco de la vortfarado en siaj gepatraj lingvoj. Ili ankaŭ ne konscias pri la malreguleco de la vortfarado en fremdaj naciaj lingvoj, kiujn ili lernas, ĉar ili ne lernas regulojn de vortfarado, sed lernas la vortkunmetojn kaj la derivaĵojn kiel apartajn vortojn. Tial la plej multaj esperantistoj ne povas doni ekzemplojn de la malregula vortfarado en la naciaj lingvoj, kaj mankas al ili unu bona argumento por Esperanto.

La malregula vortfarado en la germana lingvo kompreneble ne estas aparta eco de la germana lingvo. La aliaj lingvoj kiujn mi konas havas simile malregulan kaj komplikan vortfaradon. Estus dezirinde havi similajn esplorojn por aliaj lingvoj.

La libro de Blanke estas pli scienca kaj multe pli ampleksa ol iu antaŭa komparo inter la vortfarado en Esperanto kaj nacia lingvo. Ĝi tamen ne elĉerpas sian temon. Blanke mem indikas tion en la subtitolo de sia libro: "Kelkaj problemoj de vortfarado en Esperanto kaj en la germana lingvo en konfronta prezentado".

Olav Reiersøl

Laste aperis...

Angla-Esperanta telekomunika vortaro, Christian Bertin (1949). Rennes: Bretagne en Direct – Breizh War-Eeun, 1983. 70p. Ilus. 21cm. Pli ol 1 500 vortoj kaj esprimoj uzataj en telekomunikado, kun apendico pri kodoj, karaktraroj ks. grafike prezentitaj. Prezo: 12,30 gld.

Aventuroj de Hucklebury Finn, La (1884), Mark Twain (1835-1910). Laŭ hungarlingva koncizigo trad. Tibor Vaskó. Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 32p. Ilustris Tibor Cs. Horváth. 24cm. ISBN 963 571 105 0. Bildstria rakonto. Prezo: 4,80 gld.

Blinda birdo, La, István Nemere (1944). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1983. 118p 20cm. ISBN 963 571 104 2. Romano pri la nuntempa situacio en lando, kie regas subpremo kaj ŝtata maljusteco. Nemere uzas elstaran parolan stilon. Prezo: 15,00 gld.

10a listo de gastigantoj 1983, Pasporta Servo de TEJO. Hamburg: TEJO, 1983. 52p. Mapoj. 21cm. La plej lasta listo de gastigantoj, kiu ampleksas 561 adresojn el 50 landoj. Prezo: 6,90 gld.

El parnaso de popoloj (1913), Antoni Grabowski (1857-1921). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983. 236p. 21cm. Represo de la poemaro tradukita el diversaj lingvoj de unu el la unuaj esperantistoj. Elstara verko el la frua epoko de la Esperanta literaturo. Prezo: 33,60 gld.

Hungara antologio, komp. Vilmos Benczik (1945). Budapest: Corvina Kiadó, 1983. 448p. 24cm. Bind. ISBN 963 13 1625 4. Pli ol 200 literaturaj pecoj de la plej famaj reprezentantoj de unu el la plej brilaj, sed ankoraŭ nesufiĉe konataj literaturoj de Eŭropo. Kun kvinpaĝa enkonduko de V. Benczik kaj rekomendo de William Auld. Prezo: 57,00 gld.

Iluzioj, Lorjak (pseŭd.). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 184p. 20cm. ISBN 963 571 082 8. Originala novelaro kun "franca sprito, delikata humuro kaj funde de ŝajna cinikeco – profunda homamo". Du noveloj aperas en franca traduko kaj unu en usonlingva. Prezo: 18,00 gld.

Kleine Grammatik der Schleyerschen Weltsprache Volapük (1900), Jean-Baptiste Pinth. Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983. 12p. 21cm. Germanlingva (fraktur-litera) priskribo de Volapuko, la iama antaŭulo de Esperanto, kun antaŭparolo de R. Hauptenthal. Prezo: 6,00 gld.

Konciza katalogo de Esperanto-poŝtmarkoj. Antwerpen: La Verda Stelo, 1982 (2a kompletigita eldono). 10p. 15cm. Listo de aperintaj poŝtmarkoj kun Esperanta temo, laŭlande ordigita. Prezo: 1,20 gld.

Konstrui novan ponton (1979), Wan Yun. El la ĉina. Beijing: Ĉina Esperanto-Eldonejo, 1982 (2a eld.). 37p. Kolorilustrita de Chen Yongzhen. 19cm. 88-Es-156S. Fablo pri kunlaboro inter sciuro, leporo, ĉimpanzo kaj elefanto. Prezo: 1,20 gld.

Korea-Esperanto Vortaro, Hajpin Li. Seoul: Libera Biblioteko, 1983. 478p. 16cm. Bind. Enhavas ĉ. 38 000 kapvortojn, inkluzive de multaj fakaj terminoj. Prezo: 30,90 gld.

Kubologio, Verda Kvinopo Bonaerana. Buenos Aires: La verkintoj, 1982-3. 80p. Ilus. 17cm. Bind. Tri eseoj pri la ebloj de la magia kubo de Rubik. Prezo: 21,00 gld.


Lingva esenco de Esperanto, La, Atanas D. Atanasov (1892-1981). Rotterdam: UEA, 1983. 175p. 21cm. ISBN 92 9017 024 7. Popularstilaj artikoloj pri ĝenerale esperantologiaj temoj, kiel ekzemple fonetiko, pasivaj participoj, neologismoj, propraj nomoj, sinonimoj kaj homonimoj, interjekcioj kaj onomatopeoj. Prezo: 27,00 gld.

Lingvo internacia en perspektivo. Tôkyô: JEI, 1982. 38p. Mimeo. 26cm. Seria n-ro 4. Tri prelegoj de Ulrich Lins, Kei Kurisu kaj Ralph Harry, "Kio instigis min verki 'La danĝera lingvo'?", "Kiel tradukinto de 'La danĝera lingvo'" kaj "Kial mi restas esperantisto?". Dulingva (japana kaj Esperanto). Prezo: 6,00 gld.

Maks kaj Moric, Wilhelm Busch (1832-1908). El la germana trad. Wilfried Hofmann. Karl-Marx-Stadt/Leipzig: Esperanto-Asocio en Kulturligo de GDR, 1983. 19p. Ilus. 21cm. Amuza, ilustrita poemo por infanoj de unu el la fondintoj de la germana bildstria arto. Prezo: 4,00 gld.

Plena Esperanto-persa vortaro, B. Samimy (1913). Tehran: la aŭtoro (ne indikita), 1983. 754p. 25cm. Bind. La plej kompleta Esperanto-persa vortaro de la kompilinto de *Persa-Esperanta vortaro*, kun listo de Esperantaj vortoj el la persa, araba, turka kaj hindia lingvoj. Prezo: 90,00 gld.

Transdorsojeto, La, J. Novák, I. Špička, V. Hník. Praha: ĈEA, 1982. 70p. Ilus. 21cm. Fakaj traktoj de la transdorsojeto en judo, el i.a. didaktika kaj aktika vidpunktoj; kun listo de fakaj terminoj. Prezo: 5,40 gld.



Turo de l'popoloj, La, Han Ryner. El la franca trad. Valo. Laroque Timbaut: Cercle espérantiste de l'Agenais, 1983. 153p. Mimeo. 21cm. SAT-Broŝurservo. Romano pri la mito de la Babela Turo. Prezo: 10,20 gld.

Udžbenik međunarodnog jezika Esperanto, Božidar Popović kaj Radmila Triunjačić. Beograd: Prosvesetni Pregled, 1982. 134p. Ilus. Mimeo. 24cm. 40-leciona lernolibro, kun ekzercoj, legaĵoj kaj ambaŭdirektaj vortaretoj (Esperanta kaj serbokroata). Prezo: 18,00 gld.

Ukrainaj popolaj fabeloj. El la ukraina tradukis N. H. Andrianova. Sofia: BEA, 1983. 77p. Ilus. Mimeo. 23cm. Dudek du fabeloj, elektitaj de la tradukinto. Prezo: 6,00 gld.

Valeur culturelle de l'espéranto, La, D.B. Gregor. Rotterdam: UEA, 1983 (3a eld.). 15p. 21cm. Documents sur l'espéranto, 13F (1983). ISSN 0156-2621. Francilingva dokumento pri la kultura valoro de Esperanto. Prezo: 3,00 gld.

Verda koro, La (1937), Julio Baghy (1891-1967). Budapest: Hungara Esperanto-Asocio, 1982. 104p. Ilus. 21cm. ISBN 963 571 106 9. Ankoraŭfoja eldono de la fama, facila romaneto el la vivo de esperantistoj ekzilitaj al Siberio; por komencantoj kaj daŭrigaj kursoj; kun sintaksa resumo de K. Kalocsay kaj hungara vortareto. Prezo: 12,00 gld.

Volapük-Litteratur (1888). Saarbrücken: Artur E. Iltis, 1983. 10p. 21cm. Jubilea Eldon-serio, 4 Interlingvistiko. Represo de listo de Volapuka literaturo. Prezo: 6,00 gld.

MENDU ĈE LA LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando. Bonvolu atenti, ke al ĉiuj netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4%, kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 18% por la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas sendokostoj: por la mendoj sub la valoro de 200 guldenoj – 20%, por la mendoj super 200 guldenoj – 10%. Minimumaj sendokostoj estas 5,00 guldenoj. Antaŭdankon pro via mendo!



Seminario en Berlino

Pri la temo "Enŝaltiĝo al informretoj" diskutos junulara seminario de Komisiono pri Eksteraj Rilatoj (KER) de TEJO, kiu okazos en Okcidenta Berlino de la 6a ĝis la 13a de novembro 1983. Ankaŭ ĉi tiun seminarion de KER subvencios Eŭropa Junulara Fondaĵo.

La celo de la seminario estos informi la partoprenantojn pri la ekzistanta teknologio por prilabori, memori kaj transporti informojn per informretoj. Informretojn oni difinas kiel elektronikajn instalaĵojn por transporti informojn longdistance en entjera formo. Oni celas doni al la partoprenantoj kapablon taksii la sociajn sekvojn de tiu teknologio post analizo de la intereso de produktantoj, posedantoj kaj uzantoj. Esenca en la metodo de la prezento estos praktika renkonto kun la ekipaĵo kaj kun fakuloj.

La seminario estos dividita en tri fazojn. En la unua fazo okazos enkonduko al baza teknologio kaj ties evolu-potencialo per prelegoj de fakuloj, kun vizitoj ĉe produktantoj kaj uzantoj de informreta ekipaĵo. La celo de la dua fazo estos prepari la seminarantojn por publika diskuto, dum la tria fazo konsistos el diskutoj kun reprezentantoj de politikaj partioj, sindikatoj k.a.

Oni kunvenos en luksa domo apud lago. KER atendas la partoprenon de proksimume 50 esperantistoj kaj 50 aliaj gejunuloj. Interpretado en la germanan kaj inverse estos disponebla.

Pliajn informojn petu de TEJO/KER ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando.

● **Britio:** En sia ĵus publikigita raporto pri la agado dum la pasinta jaro, Esperanto-Asocio de Britujo resumas ankaŭ la atingojn sur la informa kampo. Pleje elstaras la fakto, ke unu bona 45-minuta programo pri Esperanto en la brita nacia radio (BBC) provokis iom malpli ol du mil informpetojn pri la Internacia Lingvo. Temas pri la programo elsendita la 23an de majo pasintjare (vidu nian numeron de junio 1982) kaj ripetita en septembro, pro la granda intereso de la publiko.

● **Soveta Unio:** De la 7a ĝis la 9a de majo okazis apud Moskvo la tradicia Centra-Rusia Regiona Esperantista Renkontiĝo. Ĉirkaŭ cent homoj el Moskvo, kiel ankaŭ el foraj kaj proksimaj lokoj de Soveta Unio, kunvenis por partopreni seminarion de aktivuloj, aŭskulti prelegojn, ĝui koncerton kaj sportajn konkursojn.

● **FR Germanio:** En nia junia n-ro (p. 105) ni raportis pri la ŝanĝoj de la gvidantaro en Germana Esperanto-Asocio. Ni tiam aparte emfazis la informan servon "Letero de leganto", kiu sub la gvido de d-ro Rudolf Fischer zorgis, ke tra la pasintaj jaroj en la germana gasetaro aperu centoj da artikoloj kaj informoj pri Esperanto. Nun venas al ni la lasta raporto de Fischer (la taskon nun transprenis alia respondeculo) kaj la rezultoj estas vere impresvekaj. Dum la pasintaj 12 monatoj en la germana gasetaro aperis 16 grandaj kaj 20 mezgrandaj artikoloj pri Esperanto en la gazetoj, kiuj estas tutlandaj aŭ regionaj. Tie oni povis legi ankaŭ koncizajn komunikojn pri la Internacia Lingvo. Aldoniĝas 89 artikoloj en lokaj gazetoj, kiuj 30-foje

raportis pri sia loka Esperanto-grupo. Aperis ankaŭ 41 leteroj de legantoj en 14 gazetoj. Kiel oni atingas tiel bonan rezulton en la informa laboro? Ŝajnas, ke la granda sekreto estas la nombro de la kunlaborantoj pri kiuj d-ro Fischer povis kalkuli — 83 aktivuloj tra la tuta FR Germanio!

● **Japanio:** Pli ol cent homoj partoprenis la 3an Seminarion en Kamakura, kiu okazis la 28an kaj 29an de majo. Al publika diskuto pri la internacieco de japanoj kaj ties konduto en la internaciaj interŝanĝoj kontribuis kvin neesperantistoj kun gravaj postenoj en la publika vivo. Poste okazis diversaj Esperanto-kursoj por 57 personoj.

● **Akademio:** La 28an de junio finiĝis elektoj por la nova estraro de la Akademio de Esperanto, por la oficperiodo de 1983 ĝis 1985. La nova prezidanto de la gvida lingva institucio de Esperanto fariĝis d-ro André Albault (Francio), kaj la vicprezidantoj restis profesoroj Paul Neergaard (Danlando) kaj Stojan Ĝuĝev (Bulgario). D-ro Werner Bormann (FR Germanio) estas elektita por la ofico de la ĝenerala sekretario de la Akademio. Nun okazas renkonsistigado de la diversaj sekcioj, per kiuj la Akademio ĉefe laboras. Iliaj direktoroj estos baldaŭ elektitaj.

● **Teatro:** De d-ro Vilmos Benczik venis jena letereto: "Danke mi ricevis kvanton de la n-ro 1983/5 de via revuo,

● **Japanio:** Dum la semajnfino de la 11a kaj 12a de junio okazis la 31a kongreso de Esperantistoj en Kansajo. 300 personoj, inter kiuj kelkaj eksterlandanoj, venis al Ikeda, por partopreni la kongreson, kiu tradicie estas unu el la plej altnivelaj Esperanto-renkontiĝoj en Japanio. Ĉi-jare okazis enkadre de la kongreso fakaj kunsidoj, Esperanto-leciono por urbanoj, simpozio pri Ĉinio, deklama konkurso kaj diversaj prelegoj i.a. de la verkisto Masao Miyamoto pri sia nova japana-Esperanta vortaro.

● **Acoroj:** Post pluraj anoncoj, kaj longa artikolo en la ĵurnalo *Açoriano Oriental*, jam de novembro pasintjare funkcias Esperanto-kurso en Ponta Delgada, Acoroj. Juna brazilano gvidas 25 lernantojn, kio estas konsiderinda nombro por tiu malgranda portugala insularo en Norda Atlantiko.

Fake

kun fotoj kaj raporto pri la budapeŝtaj teatraj eventoj. Bedaŭrinde, en la raporto pluvisis eraro aperinta en la programa faldfolio de la Teatra Renkontiĝo; nome, aperas mia nomo kiel tradukinto de *La mortintoj de Spoon River* kaj *La lasta magnetofonbendo de Krapp*. Fakte, ambaŭ tiujn verkojn tradukis Jozefo Horváth. Mi petas vin nepre publikigi pri tio ĝustigon en la tujsekva numero de *Esperanto*."

● **Prelegvojaĝoj:** D-ro P.V. Ranganayakulu, juna sekretario de Federacio Esperanto de Bharato (Hinda Unio), pasintjare fondita landa E-organizaĵo, pasigos la duan parton de novembro kaj la unuan duonon de decembro ĉi-jare en Britio. D-ro Ranganayakulu ricevis

Tiel varbas legantoj de MONATO por MONATO:


Io por ĉiu, ĉar iu pri ĉio.

Marjorie Boulton

MONATO estas la alternativa revuo, ĉiuaspekte. 40 paĝoj, riĉe ilustrita.

Konvinkiĝu mem, petante provekzempleron ĉe la eldonejo: TK/STAFETO, Miksebaan 65A, B-2130 Brasschaat, Belgio, kontraŭ du internaciaj respondkuponoj (sed vi povas fari tiun peton nur unufoje!).





vojaĝstipendion de Noriĉa Jubilea Esperanto-Fondaĵo (p/a Norman Williams, 237 Two Trees Land, Denton, Britio M34 1QL; telefono 161 - 336 2834). La juna gasto el Hinda Unio planas prelegvojaĝi tra Britio antaŭ ol reiri hejmen kaj organizi la duan Esperanto-Kongreson de Hinda Unio, komence de 1984 en Bangaloro.



● **Antologioj:** Internacia Kultura Servo en Zagrebo (Jugoslavio) estas unu el la plej aktivaj movadaj entreprenoj. Aldone al sia ĉefa aranĝo – Pupteatra Internacia Festivalo, kiu en oktobro ĉi-jare okazos la 16an fojon – IKS entreprenas ankaŭ grandajn eldonprojektojn. Post la antologia volumo *Moderna kroatia prozo* (1979), nun aperis ankaŭ la

300-paĝa *Kroatia poezio*. Tiukaze pluraj el la 68 aŭtoroj reprezentitaj en la libro ĉeestis la lanĉoceremonion de la verko, la 16an de juno, en la zagreba Centro por Kulturo kaj Informado. Esperantistajn tradukojn el la nova antologio deklamis konataj aktoroj Vida Jerman, Mladen Šerment kaj Julije Perlaki. Inter la ĉeestantoj troviĝis ankaŭ la bardo Dragutin Tadijanović (sur la foto), kies ligoj al Esperanto datiĝas de 1936, kiam aperis lia poemaro *Kanto de mia koro* (en la traduko de J. Velebit).

● **Periodaĵoj:** Unu el la plej interesaj iniciatoj sur la kampo de la Esperanta gazetaro dum la lasta jardeko sendube


estas *Juna amiko*, facila kvarmonata revuo por lerneĵanoj. Lanĉita en 1973 fare de Hungara Esperanto-Asocio kiel eldonanto kaj s-ro Géza Kurucz kiel redaktoro, *Juna amiko* iom malfacile sed sufiĉe vaste populariĝis kaj atingis la eldonkvanton de pluraj miloj da ekzempleroj. Tamen, antaŭ proksimume jaro, la redaktoro ekŝiĝis kaj la periodaĵo ĉesis aperi. Hungara Esperanto-Asocio ĵus decidis daŭrigi la vivon de ĉi tiu unika revueto. La nova redaktoro de *Juna amiko* estas s-ro Oldřich Kníchal (Budaórs. Parkó u. 3.II.19, H-2040 Budapest), konata movada verkisto kaj ĵurnalisto el Ĉeĥoslovakio, kiu jam de pluraj jaroj vivas kaj laboras en Budapeŝto.

Persone

● **Auld:** Akademiano William Auld, unu el la plej multvolumaj aŭtoroj en la originala kaj traduka Esperanta beletro, aldonos baldaŭ du novajn ampleksajn librojn al sia verkaro. Kiel jam anoncite, *Nova Esperanta antologio* (sub lia redakto) jam estas provlegata kaj devus aperi frue en la venonta jaro. Auld ĵus finis la laboron super *Nova krestomatio*, kiu devus fariĝi moderna anstataŭanto de la klasika zamenhofa *Fundamenta krestomatio*. La nova verko konsistos el ok sekcioj kaj ampleksos plurajn centojn da paĝoj. Ankaŭ ĝi aperos ĉe UEA, proksimume post unu jaro. Auld siatempe ricevis la komision kompili la verkon en la kadro de la laborplano de UEA por la Jubilea Jaro 1987.

● **Saheb-Zamani:** En 1975 ekzistis nenia Esperanta lernilo en Irano. La postan jaron aperis *La dua lingvo – Esperanto-persa lernolibro* de d-ro M.H. Saheb-Zamani. Tiu ampleksa lernilo (219 paĝoj) havis ĝis nun ses represojn en suma eldonkvanto de 40 500 ekzempleroj, kio sendube estas siaspeca rekordo en la nuntempa movada libromerkato.

● **Haddon:** La juna prezidanto de Junularo Esperantista Brita, Robert Haddon (1958), ĵus posteniĝis kiel sekretario ĉe Brita Esperanto-Asocio en Londono. La ĉefa profesia spertiĝo de Haddon okazis en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, kie li pasigis la tutan pasintan jaron, kiel ano de la Volontula Servo, kaj okupiĝis pri grafi-



kaj, redakciaj kaj sekretariaj laboroj. Haddon certe estis unu el la plej bonaj volontulaj laborantoj, kiuj oficis en la CO dum la lastaj jaroj.

● **Jung:** Jam meze de januaro ĉi-jare ni ricevis letereton de Teo Jung, honora membro de UEA, fondinto, multjardeka redaktoro kaj posedanto de *Heroldo de Esperanto*. Jung mem petis, ke ni aperigu nur en ĉi tiu revunumero jenan dankesprimon: “La persona noto pri mia 90-jariĝo en la pasintjara novembra numero de *Esperanto*, rezultigis tiom da gratulaj kartoĵoj, leteroj kaj telegramoj el la tuta mondo, ke estas al mi ne eble danki al ĉiu gratulinto aparte. Tial ĉi tiu ĝenerala dankesprimon, kune kun miaj koraj salutoj kaj bondeziroj al la redakcio kaj gelegantoj de ĉi tiu revuo.”

NOVJORKA OFICEJO DE UEA

AMIKOJ (minimуме \$ 10): FR Germanio: Esperanto-Grupo Nürnberg.

PATRONOJ DE TEJO 1983

Aŭstralio: Laurence E. Cresswell. Aŭstrio: Josef E. Hartl. Belgio: Elvire De Coene. Britio: E.E. Mallett; Tom C. Fraser. FR Germanio: Uwe Joachim Moritz. Hispanio: Ben Parkinson; Juan Azcuénaga Vierna; E. Gimeno Palau. Italio: Clara Gubbioli Carioli; Giuseppina Picciotto De Vita. Nederlando: C.P.J. de Boer; H.B. Snel; Internacia Esperanto-Instituto (IEI); M. Meywes; W.H. Mook. Nov-Zelando: V.R. Moore.

SOCIETO ZAMENHOF 1983

Aŭstralio: Ralph Harry. Italio: C. Azzi. Meksikio: Julie L. Regal. Nederlando: Ru H. Bossong. Usono: Eugene H.

Thompson Jr.; Gertrude Novak; Thomas H. Goodman; Edwin Hedges; Milton O. Brown; William W. Glenney.

DONACOJ 1983 (Gld.)

ĝis la 17a de julio

FONDAĴO KER DE TEJO: Eŭropa Konsilantaro: 5 837,24.

PROPAGANDA KONTO: Nederlando: J.v.d. Teems 10,00. Sumo ĉi-jara 70,00.

FONDAĴO TEJO: Diversaj malgrandaj: 1,50. Sumo ĉi-jara 209,52.

FONDAĴO AGADO ĈE UN KAJ UNESKO: FR Germanio: Werner Heinrich 2 130,00.

Al ĉiuj tre koran dankon! UEA



25-jara instruistino de elementa lernejo deziras korespondi kun geknaboj kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kaj bildkartojn: Luo Jin-we, Douqiao xiaoxue, 550001 Guiyang-shi, PR Ĉinio.

Ĉiu serioza esperantisto legu la gravan verkaĵon *Por multoble pli-vastigi nian movadon*. Prezo: 22 fr. frankoj aŭ 8 poŝtaj kuponoj. Adreso: Ligue «Pro Unesco», 24 ave. de Riedisheim, F-68100 Mulhouse. Poŝta konto: 16.233.37 C Paris. — Sama adreso: La sukcesaj *Facilaj dialogoj*, similaj al la famaj *Amuzaj dialogoj*. Prezo: 20 fr. fr.

der esperantist, organo de Esperanto-Asocio el GDR. La ses 24-paĝaj kajeroj jare, presitaj, enhavas abundan materialon, precipe pri Esperanto-movado en GDR kaj aliaj socialismaj landoj, pri interlingvistiko, esperantologio, historio de Esperanto-movado, metodiko. Redaktas Detlev Blanke. Abono ĉe UEA: 10,50 guldenoj.

Skandinavo kaj hispano, 51 kaj 40 jaraĵ, deziras renkontiĝi kun du esperantistinoj inter 30 kaj 40 jaroj, por pasigi unu monaton tute senpage en Kanariaj Insuloj. Respondoj nur kun fotoj al: Esperanto-hejmo, Apartado 2333, Las Palmas G.C., Hispanio.

46-jara komercisto-entreprenisto, de jugoslava deveno, 14 jarojn vivanta en Kanado, deziras korespondi pri diversaj temoj kun liberaj sinjorinoj, kiuj ŝatas vojaĝi. Dragan Novaković, P.O. Box 334, Delson, Que., Kanado J0L 1G0.

Anoncetoj

Tarifo: ĉiu vorto kostas 0,90 guldenojn (unu internacian respondkuponon). Pri la enhavo de la anoncetoj kaj anoncoj ne respondecas la redakcio. Ni donas nenian rabaton pro la ripeta aperigo de anoncetoj.

Studi matene, ferii posttagmeze, jen la kursformulo de la Internacia FERIA Altlernejo de Kultura Centro Esperantista, CH-2301 La Chaux-de-Fonds (Svislando). Petu informilon!

Korespondi kaj interŝanĝi diversaĵojn kun geamikoj en FR Germanio, Usono, Japanio, Francio kaj Italio deziras s-ro Ditimar I. Stanev, Bulv. Anton Ivanov — 55, Bl. B, apt.3, BG-4004 Plovdiv, Bulgario.

15-jara studento deziras samaĝajn korespondantojn, kies naciaj lingvoj estu la portugala, franca, angla aŭ germana. Li interesiĝas pri historio, geografio, turismo kaj lingvoj. Patrick Petiot, Caixa Postal 96920, BR-28600 Nova Friburgo, Brazilo.

Du 16-jaraj lernantinoj serĉas korespondantojn diverslandajn: Radiana Ĉukleva (dekstre) kaj Virginia Nikolova. Komuna adreso: Gimnazio «Ĥristo Smirnenski», Rakitovo, okr. Pazarĝik, Bulgario.

25-jara mararmeano, ano de korvet-ŝipo KRI "Fatahillah", deziras korespondi kun ĉinlandaj esperantistoj pri ĉiu temo. Budi Santoso, Jl. Tretis 10, Malang-Jalim, Indonezio.

Helpu nian administradon! Bonvolu ĉiam mencii vian uea-kodon, kiam vi skribas aŭ pagas al la Centra Oficejo.

Instruistino (19-jara) deziras korespondi kun geknaboj diverslandaj: Diana Iskrev, str. Kiril i Metodij 77a, ap. 27, Stara Zagora, Bulgario.

45-jara agronomia inĝeniero kaj agrikultura ekonomikisto ŝatus korespondi tutmonde pri ĉiuj temoj: Hilmar Ilton Santana Ferreira, Rua Alexandra Fleming, 210 Goes Calmon, BR-45600 Itaduna, Bahia, Brazilo.

60-jara esperantistino serĉas 25 korespondantojn. Astrid Feuk, Söderby Höjden, S-13700 Västerhaninge, Svedujo.

Eldonejo - librejo SONORILO

- **L'espéranto dans l'enseignement:** d-ro Pol Denoël. 1982 (2a eld). 30p. 23cm. Informbroŝuro pri Esperanto kaj ĝia instruado. 100 BF.
- **Initiation théorique et pratique:** d-ro Pol Denoël. 96p. Ilus. 22cm. Bind. Gramatika lernolibro kun bonaj klarigoj, plej taŭga por publikaj kursoj. 180 BF.
- **Aerpoŝtaj leterpapiro kaj kovertoj,** kun surprisitaĵo stelo kaj la vorto "Esperanto". Pakajoj de 50 folioj aŭ 50 kovertoj: 145 BF.
- **Gluafiŝo: Internacia Lingvo Esperanto,** kun homa figuro kaj verda stelo. 7 × 17 cm. 25 BF.
- **Novjaraj gratulkartoj:** kvar diversaj koloraj kartoj (kun kovertoj) en kvin lingvoj. Dua eldono. 60 BF.
- **Leksikono de Bovy:** J.P. Bovy. Herstal: APE, 1982. 105p. Mimeo. 21cm. Vortareto en kvin lingvoj (Esperanto, angla, franca, nederlanda, germana). 240 BF.
- **Eldonejo-Librejo SONORILO** estas peranto de: *Budapeŝta informilo, El popola Ĉinio, Heroldo de Esperanto, Monato, Norvega esperantisto, Oomoto.* Petu abonprezojn en via nacia valuto.
- **De la 5a de okt. 1983 ĝis la 1-a de marto 1984** nia Librejo aŭtomate donas rabaton de 5%, se via mendo superas la valoron de 500 BF (ekskluzive la sendokostojn). Ni vendas pli-malpli ĉion momente disponeblan en la Esperanta libromarkato. Al ĉiuj netaj prezoj de libroj aldoniĝas sendokostoj: 20% por la mendo sub la valoro de 1800 BF, kaj 10% por la mendoj de pli granda valoro. Niajn eldonaĵojn vi povas mendi ĉe la Libroservo de UEA, ĉe via kutima landa liveranto aŭ rekte ĉe:

**Eldonejo-Librejo SONORILO, Doornstraat 22,
B-2610 Wilrijk (Antwerpen)**

Belgio. ☎ (03) 827 24 05.

Ni estas konataj pro malaltaj prezoj kaj rapida servo!

Ĉu vi havas ion por diskonigi
al ĉiuj en la Movado?

Se jes, la plej simpla kaj la plej malmultekosta maniero por atingi tion estas anonci en ĉi tiu revuo. Memoru, ke la revuon legas pli ol 10 000 homoj en pli ol cent landoj. Rerigardu al nia tarifo de anoncoj (sur la dua kovrila paĝo). Ne valoras cirkuleri al cent homoj, se vi por la sama mono povas per anonco atingi centoble pli vastan publikon!

John Wells: Lingvistikaj aspektoj de Esperanto

Rotterdam: UEA/CED, 1978. 76p. 23cm. ISBN 92 9017 021 2. Scienca analizo de la lingvistikaj aspektoj de Esperanto: fonetiko, morfologio, sintakso, leksiko kaj semantiko. Kun bibliografio kaj indekso de terminoj. Prezo: 12,00 gld.

Nova afiŝo por via varblaboro!

Kiel logi novajn esperantistojn? Unu potenca argumento estas la etoso de niaj renkontiĝoj – precipe la junularaj. Nia nova afiŝo emfazas tion.


Ĝi havas blu-verdan kaj nigran preson sur blanka dika papero. La formato estas 29,7 × 43 cm. La foto estas nigra-blanka. Sube estas libera spaco, kie oni povas loki nacilingvan tradukon de "por agrablaj renkontiĝoj" kaj/aŭ aldoni informojn pri venonta kurso aŭ inform-vespero aŭ kongreso kaj/aŭ kontaktadreson kaj/aŭ telefonnumeron.

Prezo ĉe la Libroservo de UEA: 3,00 (3,54 por nederlandanoj) gld., plus sendokostoj, por 10 ekzempleroj, kio estas la minimuma mendokvanto. Triona rabato ekde 30 ekzempleroj.



jam kompligitita plena verkaro de zamenhof?

Nu, preskaŭ! Aperis ĝis nun dek dikaj, luksaj volumoj. La tuto estas aĉetebla kiel kompleto por 390,00 gld. La unua volumo (*unuaj libroj por esperantistoj*) ne plu aĉeteblas ekster la kompleto.



eldonejo ludovikito

Aliaj 9 haveblas unuope (po 39,00 gld). Aperis ankaŭ du "kromkajeroj" (po 33,00 gld). Mendeblaj do estas: ■ *la inkunabloj de esperanto* ■ *ni laboru kaj esperu!* ■ *antaŭen al la laboro!* ■ *tamen la afero progresas!* ■ *hebreo el la geto* ■ *kun gradaj paŝoj eksterlanden!* ■ *klopodis organizi, sed vane!* ■ *por kaj kontraŭ reformoj!* ■ *mortinta, sed senmorta!* ■

Kromkajeroj: ■ *senlegenda biografio de l.l. zamenhof* ■ *korespondaĵo ludovikologia* ■ Ĉio ĉe: uea, jei, kleg.

Jen postmorte la vivoverko de la iama vicprezidanto de la Akademio, elstara esperantologo.

Inter la temoj, kiujn traktas ĉi tiu kolekto de esperantologiaj eseoj troviĝas ankaŭ la jenaj:

- Fonetiko; Vortfarado; Prepozicioj
- Sinonimoj kaj homonimoj en Esperanto
- La arto traduki; Propraj nomoj
- La elementoj de Esperanto, ĉu arbitre elpensitaj?
- Onomatopeoj en Esperanto.

La lingva esenco de Esperanto, de Atanas D. Atanasov (1892-1981). Rotterdam: UEA, 1983. 176 p., 21 cm. ISBN 92 9017 024 7. Prezo: 27,00 gld. plus sendkostoj. Sur luksa papero, kun eleganta kovrilo el plastumita kartono. Mendu ĉe la Libroservo de UEA.

**ATANAS D.
ATANASOV**

**LA LINGVA
ESENCO DE
ESPERANTO**

UEA, ROTTERDAM, 1983

Post la originala *Hungara antologio* de 1933 nun fine aperis la nova, lukse bindita eldono de

Hungara antologio

Pli ol 200 literaturaj pecoj de la plej famaj hungaraj aŭtoroj. Kompilita kaj kun ampleksa enkonduko de Vilmos Benczik.

Eld. Corvina Kiadó, 1983. 448 p. 24 cm. Bindita kun kvar-kolora kovrilo. ISBN 963 13 1625 4.

Mendu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam. Prezo: 57,00 (por Ned. 59,28) gld. plus sendokostoj.

"Tiu ĉi nova *Hungara antologio* pluetendas... la gamon prezentitan en la unua, kaj same entuziasme ni voras ĝin..."



William Auld